

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

AKTUALE PRI
ZAMENHOF

•

A.M.M' BOW —
PREMIITO
DE UEA

•

LEVSKI —
GLORO
BULGARA

•

MALUTILAJ
KUTIMOJ

•


NIAJ
VETERANOJ

•

INTERNACIA
AGADO

•

DISTROJ



JARO 56 • N-RO 4 • APRILO • 87

Aktuale pri Zamenhof



*Kian la popoloj povas lerni
sunkompreni, ĉar ili estas
receptistoj sin malami.*

Zamenhof

70 jaroj
depost
lia
morto

El la heredaĵo de ĉiu granda personeco oni povas preni valorajn pensojn, konsiderojn, rekomendojn, kiuj posedas gravan signifon ankaŭ por la nunaj kaj estontaj generacioj. Tia estas la kazo ankaŭ kun d-ro L.L. Zamenhof.

Estas vaste konata la fakto, ke Zamenhof pagis sufiĉe grandan tributon al diversaj ideologioj, ofte tute kontraŭaj. Li estas filo de sia epoko kaj reflektis en siaj ideologiaj streboj multon el ties pozitivaj kaj negativaj specifajoj. Tiu fakto ligiĝas kun la biografioj de multaj liaj eminentaj samtempuloj.

Tamen la vivo, kiu faras komplimentojn al neni, eĉ al plej ŝatata geniulo, faras siajn senpartiajn korektojn kaj kiel sur televida ekrano montras la tragikajn eraĵojn de tiuj grandaj spiritoj, kiuj senlace strebis malĉesigi novajn vojojn por la plua nobla evoluo de la homaro.

Ĝuste tiel okazis ankaŭ kun iuj eraraj pozicioj en la ideologia formiĝo de Zamenhof.

Kio daŭra kaj ege pozitiva, respondanta al la idealoj de la progresema homaro, restis el la tuta ideoaro kaj idealoj de la kreinto de Esperanto? Pro kio monda neesperantista organizaĵo kiel UNESKO jam kelkfoje deklaras lian kreaĵon grava akiraĵo de la homa kulturo kun netransirata signifo por la evoluo de la homaro?

Sendube, sur la unua loko oni devas meti lian sinceran humanismon, kiu ne forlasis lin ĝis lia lasta spiro. Li restis „nekorektebla“ humanisto, kio vidigas en ĉiu lia pli signifa iniciato.

Se li ne estis profunde sociema, humana naturo, li ne estus laborinta tiel fervore, obstine kaj celdirekte sur la problemoj pri konkreta realigo de la internacilingva ideo. Tiu ideo, kiel konate, estas tre malnova, kelkjarcenta. Ankaŭ la provoj realigi ĝin nombras centojn kaj centojn, baldaŭ atingos la rondan ciferon mil. Kaj pri iuj el ili oni povas diri multajn laŭdajn vortojn.

Sed pro historiaj, kaj certe ankaŭ pro iuj personaj kaŭzoj ili parte aŭ entute fiaskis. La historio benis, kvankam kun dentgrincado kaj sen granda entuziasmo, nome la kreitan (ne nur iniciatan) internacian lingvon de Zamenhof.

Do, dualoke oni devas emfazi lian fidelecon al la ideo de lingvo internacia kaj la talentan lian laboron

por sukcesa realigo de tiu ideo. Simila rezulto estas atingebla per longjara persista analiza kaj sinteza laboro.

Trioloke venas la neŝancelebla koncepto de Zamenhof, lia dumviva revo labori por pacigo de tiu maltrankvila mondo, kontribui per io konkreta, laŭ siaj personaj ebloj, al kreo de internacia komprenemo, interpopola kompreniĝo, amikeco, kunlaborado sur kultura tereno, al elimino de la milito kiel rimedo por solvo de teritoriaj, ekonomiaj, religiaj, ideologiaj k. a. disputproblemoj.

Sian kredon je la venko de tiu ideo pri interpopola paco li bonege esprimis ankaŭ en poezia formo:

„Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.“

Lastloke (laŭvice, sed ne laŭ graveco) oni devas memori pri lia kvazaŭ denaska demokratismo en la plej bela senco de tiu vorto. Li estis demokrato ne nur laŭ sia tuteca ideologia formiĝo, sed ankaŭ en siaj praktikaj ĉiutagaj rilatoj kun la ceteraj homoj, precipe en la gvidata kaj direktata de li organize kaj spirite esperantista movado. Tio validas ankaŭ pri liaj rilatoj kun diversaj institucioj.

Mi intence ne tuŝas tie ĉi liajn personajn kvalitojn: bonega poligloto, majstra fajna filologo, modesta ĝis abnegacio personeco k. s., ĉar tio ne estas rekte ligita kun la temo de mia artikolo.

Konklude:

Por prezenti al la hodiaŭa esperantistaro la plej gravajn trajtojn el la ideologio de d-ro Zamenhof, sufiĉas memori la menciitajn kvar momentojn, tamen en kompleksa unueco. Ĉu el lia humanismo, el lia fideleco al la internacilingva ideo, el lia pacamo, el lia demokratismo iu ereto estas malkovriginta por nia ege streĉa epoko? Ĉu ĉio ĉi en sia tuteco, integreco kaj komplekseco estas nenecesa al la nunaj generacioj? Ĉu sen apliko de tiuj ideologiaj principoj, tiel karakterizaj por Zamenhof, oni povas solvi la brulantajn problemojn de la hodiaŭa kaj morgaŭa mondo? Sufiĉas nur vicigi similajn demandojn por veni al la ĝusta, Zamenhofstila respondo: Nel!

La plej ĉefa problemoj de nia epoko estas la malararmado, la laŭetapa neniigo de la nukleaj, kemiaj kaj aliaj amasmortigaj armiloj, plena elimino de la milito kiel maniero por solvo de kiu ajn internacia aŭ interŝtata problemoj.

La adeptoj de la malararmado povas atingi sian celon elirante nur el similaj ideologiaj pozicioj, kiuj estis karakterizaj ankaŭ por L.L. Zamenhof, lasinta ilin al ni esperantistoj kaj al la tuta homaro kiel plej sanktan heredaĵon. Kaj tiam la devizo „mondo sen armiloj, mondo sen militoj“ tute koincidas kun la strofo el la Zamenhofa poemo „La espero“, fariginta himno de la monda esperantistaro:

„Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.“

Nikola ALEKSIEV



LA PREMIO ZAMENHOF 1986: ENKONDUKO AL LA JUBILEA JARO

En la ĉefsidejo de Unesko en Parizo, Francio, okazis la dua transdono de la Premio Zamenhof je la 16-a de decembro. UEA starigis tiun premion en 1985, „por distingi elstarajn personecojn, kiuj laŭ la opinio de la tutmonda esperantistaro aparte kontribuis al la monda paco kaj internacia kompreniĝo.“ Kompreneble, alia celo estas altiri pli da atento al Esperanto per ĝia ligo kun ekstermovadaj gravuloj, kiuj laboras por similaj idealoj.

Ci-foje la premiito estis s-ro Amadou Mahtar M'Bow, la ĝenerala direktoro de Unesko. La paroladoj — enkonduka de Claude Piron, transdona de Grégoire Maertens, akcepta de s-ro M'Bow — reliefigas la kialojn por tiu elekto. Ili prezentiĝis antaŭ okdeko da ĉeestantoj, inkluzive de gastoj kiaj prof. André Martinet, unu el la plej eminentaj francaj lingvistoj, la pola ambasadoro (kiu salutis la kunvenon), funkciuloj de Unesko k. s.

Ĉi-sube legi la paroladon de s-ro Amadou Mahtar M'Bow.

„Ni dividas ion profunde komunan: nian kredon je la homo“

„Sinjoro Prezidanto, kara Profesoro (Piron),
gesinjoroj,

Antaŭnelonge mi legis historian verkon, kiu okupigas pri la 19-a jarcento. Unu fakto frapis min tiam, fakto kiu estis en tiu epoko memevidenta, sed kiu hodiaŭ ŝajnas al ni apenaŭ kredbla: letero sendita de Londono al Delhio bezonis ses monatojn por atingi sian ricevanton, kaj ĝia sendinto devis atendi unu jaron por ricevi eventualan respondon. Hodiaŭ tia letero farus la saman vojaĝon en du aŭ tri tagoj, telegramo en unu aŭ du horoj, teleksio alvenus tuj. La tuta tero estas nun enplektita en ĉiam pli densa reto de kontaktoj kaj informinterŝanĝoj, pere de kiuj kreskanta nombro da personoj sin trovas ligitaj al la mondo en ĝia tuteco, kaj ĉiutage spertas ĝian senliman diversecon.

Estas la ekesto de tia evoluo, kiu sendube instigis antaŭ cent jaroj d-ron Zamenhof koncepti unikan komunikilon, lingvon neŭtralan, apartenantan nek al la propra nek al ajna nacio,



Parolas la ĝenerala direktoro de Unesko Amadou Mahtar M'Bow

kapablan ekde tiam funkcii kiel komuna komunikilo por ĉiuj nacioj. . . Atestanto de senfinaj kvereloj rezultantaj el la miskomprenoj, kiuj

regis inter la malsamaj religiaj kaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof tiam iniciatis Esperanton, kiel komunan malfermilon kaj komprenilon, perilon de interpopola proksimiĝo kaj finfine — kiel ĝia nomo sugestas — de espero, de fido je mondo de universala frateco.

Kiel emfazis la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, pri kiu vi ĵus parolis, sinjoro Prezidanto, Esperanto nun definitive prezentigas kiel unu el la plej efikaj iloj de internacia interkompreniĝo, favoranta komunajn interrilatojn en ĉiuj sferoj de kulturo kaj scienco. Fine, la vivanteco de Esperanto manifestiĝas ankaŭ en tio, ke la Esperanto-movado estas movado de profunde humanisma inspiro. Ĝi estas movado, kiu frontas ankaŭ pli vastajn demandojn, kiuj preteriras la nuran zorgon diskonigi la lingvon. Tiel, kunveno de fakuloj organizita pasintjare en la ĉefsidejo de Unesko fare de UEA, traktis temojn kiel: „Ĉu oni povas akcepti la modelon: unu lando, unu nacio, unu lingvo?“; „Kia estas la estonteco de minoritataj lingvoj?“; „Kion fari pri la lingvoj, kiujn hereĝis la kolonia sistemo?“

Do Esperanto lokis sin ĉe la kerno de plej vivanta kaj aktuala problemaro, tiu de la vojoj kaj metodoj por proksimiĝi la popolojn kaj kulturojn de la mondo per helplingvo kun universala celo, kiu ekzistas kune kun ĉiuj naciaj kaj regionaj lingvoj sen minaci iun ajn; sed mi aldonu ankaŭ, ke tiu ĉi lingvistika aspekto integriĝas en multe pli vastan humanisman vizion, kaj sendube, apartigita de tiu humanisma vizio, la teknika aspekto de la lingvo ne permesus vere kompreni, kio estas la Esperanto-movado.

Jen kial, sinjoro Prezidanto, mi deziras ke Esperanto, kiun jam alprenis centoj da miloj da homoj en la tuta mondo, same kiel multnombraj universitatoj, estu ankoraŭ pli vaste uzata en la estonteco, kaj ke la esperantista komunumo, kune kun ĉiuj esperoj, kiujn ĝi portas en si, daŭre plivastiĝu en ĉiuj landoj.

Ĉi tiu premio estas sendube multe pli grava por mi ol multaj premioj, kiujn mi jam ricevis. Kiam mi unuafoje ĉeestis la kongreson de via asocio en Rejkjaviko, mi estis profunde emociita pro la sentemo de la membroj rilate la plej premajn problemojn de nia epoko, pro ilia preteco kontribui pli vastskale, sendube, ol povis d-ro Zamenhof, al la proksimiĝo de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj de la mondo. Ankaŭ vi, sinjoro Prezidanto, ne aŭskultas tiujn, por kiuj ĉiu humanisma projekto fariĝas projekto utopia. Ĉar — kiel vi diris — la utopio, kiu inspiris d-ron Zamenhof, efektiviĝis kaj efektiviĝas.

Jen kial mi havas la plej altan respekton por ĉiuj, kiuj partoprenas en la Esperanto-movado, kaj mi ĉiam ĝojas povi interŝanĝi opiniojn kun ili, ĉar mi scias, ke ni dividas ion tre komunan: nian kredon je la homo, kiu ajn estas la koloro de lia haŭto, kiu ajn estas lia religio, kiu ajn estas la lando kie li loĝas.

Tial, sinjoro Prezidanto, je mia propra nomo, same kiel je la nomo de Unesko, al kiu ĉi tiu honoro iras pere de mia persono, mi petas vin kredi, ke en ĉi tiu Jubilea Jaro de Esperanto mi plene estimas la valoron de la premio, kiun vi ĵus transdonis al mi kaj mi tre profunde vin dankas pro ĝi. Dankon al ĉiuj.”

(El „Esperanto“, n-ro 1/1987)



ESPERANTO EN INTERNACIA LINGVISTIKA BIBLIOGRAFIO

Denove aperis Esperanto-ĉapitro en la granda jara bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA). Ĝus aperis la bibliografio por 1985. En kvin volumoj la kompilaĵo listigas pli ol 42 000 sciencajn artikolojn, kiuj aperis dum la jaro. La kvin volumoj traktas: 1) literaturojn de anglalingvaj landoj (inkluzive neanglalingvajn minoritatajn literaturojn), 2) literaturojn de aliaj mondpartoj, 3) lingvistikon, 4) ĝeneralan literaturon (t. e. verkoj ne limigitaj al unuopaj literaturoj aŭ geografiaj lokoj) kaj 5) folkloron.

La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo. La ĉapitro „Helplingvoj: Internaciaj Lingvoj“ enhavas 310 erojn, kiuj plejparte traktas la lingvistikon de Esperanto. Tio

represas ioman kreskon kompare kun antaŭaj jaroj (1982: 253 eroj; 1983: 241 eroj; 1984: 286 eroj). Por ĉiu ero aperas ĉiuj bazaj bibliografiaj informoj, kaj oni ankaŭ detale analizas ĉiun eron laŭ temo kaj subtemoj. Tiuj temoj kaj subtemoj estas siavice listigitaj en tema indekso por la tuta bibliografio. La tema indekso estas giganta: en presita formo ĝi ampleksas pli ol 3000 kolumnojn de grandformata volumo.

Kompilis la ĉapitron „Helplingvoj: Internaciaj Lingvoj“ d-ro Humphrey Tonkin, Usono, d-rino Jane Edwards (Usono) kun helpo de d-ro W.A. Verloren van Themaat (Nederlando). La bibliografio, 1985 MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures, estas konsultebila en ĉiuj ĉefaj esploraj bibliotekoj de la mondo.

Fiero kaj gloro bulgara



Vasil Levski — partoprenanto en la Unua Legio de Rakovski en Beogrado, 1862.

„Se niaj grandaj viroj ne povis atingi la majestecon de la eŭropanoj, la kulpo ne estas ilia, kulpas la cirkonstancoj kaj la medio, kiuj malhelpis la unuajn kaj helpis la duajn. Ni, preskaŭ sen risko erari, povus supozi, ke se sur la loko de Levski estus kiu ajn, ties kuraĝo kaj esperoj estus frakasitaj jam en la komenco de la malegala batalo.

Homo, kiu komencas de a, b, kontraŭ kiu estas ĉio — kia kuraĝo, kia kredo je la estonto!“ (Zahari Stojanov, Enkonduko al „Biografio de Vasil Levski“, Sofio, 1977)

„Levski en plej alta grado estas legendo kaj reala homo samtempe. La historiaj dokumentoj ne detruas la romantikan figuron el la legendoj. Male — ili plene konfirmas ĝin. . . Ili aldonas novan dimension al lia figuro, montrante lin samtempe kiel teoriiston, organizanton kaj elstaran revoluciulon, kiu povas viciĝi apud la gigantoj de la dekaŭa jarcento. Ĝis plej alta grado la principoj, sur kiuj Levski formis sian revolucionarajn organizaĵojn, antaŭmontras tiujn de Lenin kaj de la bolŝevikoj. Tiuj liaj principoj. . . estis originalaj kaj ne havis paralelojn en aliaj eŭropaj revoluciaj movadoj.“

„La bildo de la libereco apenaŭ estus havinta pli traŝan enkarignon ol tiun gajan, vivplenan junan ribelanton kun „muskoloj de atleto kaj okuloj de magiisto“¹. La turkoj nomis lin Ĝin Gibi — fantomo, flugilhava fantomo de la nokto, maltrankviliganta la imperion kaj foraperanta senspure tuj, kiam oni faras provon kapti lin. Kaj la bulgarioj donis al li alian nomon por esprimi kion li prezentis por ili: oni nomis lin Apostolo de la libereco. Li estis la vivanta enkorpiĝo de la popolaj esperoj. Li engaĝis la penson kaj la fantazion de sia popolo kiel neniu alia antaŭ kaj post li.“

(Mercia MacDermott, „Apostolo de Libereco“, Sofia Pres, 1980)

Vasil Levski — la plej hela, plej alloga kaj plej impona figuro en la bulgara naci-liberiga batalo, vivas en la popola memoro kiel ekzemplo de sinofero, humaneco kaj morala pureco. En la nomo de sia granda celo — la liberigo de Bulgario elsub la osmana jugo, — li rezignis pri ĉiuj surteraj ĝojoj, pri propra vivo, pri simpla homa feliĉo. . . Li plene dediĉis sin al la batalo. . .

Cu povas esti tasko pli ampleksa, pli riskoplena, pli malfacila ol tiu, kiun Levski starigis al si kaj komencis realigi en la jaro 1869 — sen ies ajn helpo, sen iaj ajn rimedoj, nur per siaj propraj du nudaj manoj, antaŭ ol estis fondita en Bukureŝto la Bulgara Revolucia Centra Komitato sub la prezidanteco de Ljuben Karavelov. . .

Per ĝenerala revolucio fari fundamentan ŝanĝon de la nuna ŝtata despota-tirana sistemo kaj anstataŭi ĝin per demokratia respubliko (popola regado). Sur la sama teritorio, kiun niaj praavoj per la forto de armiloj kaj per sia sankta sango akiris, kaj sur kiu hodiaŭ kruele furiozas turkaj rabistoj kaj janiĉaroj³, kie regas la rajto de la perforto, oni konstruu templon de la Vero kaj justa Libero, kaj la turka ĉorbagĉa⁴ sistemo cedu lokon al la Konkordo, Frateco kaj perfekta Egaleco inter ĉiuj nacioj. Bulgarioj, turkoj, hebreoj ktp., estos egalrajtaj ĉiurilate — en religio, en nacieco, en civitaneco, ĝenerale en ĉio. Ĉiuj respektos unu Komunan Leĝon, kiu estos aprobita per voĉdonado fare de ĉiuj naciecoj.

(El la Statuto de la Bulgara Revolucia Komitato, verkita de V. Levski, eldonita en 1870)

Nur kelkajn jarojn pli malfrue, rezulte de la „giganta agado de tiu nia patrioto“² estis kreita kaj ekfunkciis rimarkinda revolucia organizaĵo — pli ol ducent komitatoj en urboj kaj vilaĝoj, dissemataj tra tuta Bulgario. Gvidprincipo en la organiza vivo de la komitato estis la demokratia principo — libera diskutado de la problemoj, voĉdonado kun subigo de la malplimulto al la volo de la plimulto.

Levski kredis, ke la bulgara popolo devas apogiĝi nur sur siaj propraj fortoj, arastataŭ atendi kaj akcepti helpon. Prenante en konsidero la ligitcon de la bulgara liberiga batalo al la politiko de la grandaj eŭropaj ŝtatoj, li opiniis, ke per mobilizo de ĉiuj enlandaj fortoj eblas la efektivigo de armita revolucia akcio en nacia skalo, rezulte de kio la bulgara popolo transformiĝos en aktivan forton en la granda eŭropa politiko ĉe solvado de la tiel nomita „Orienta Demando“, en faktoron, kiu puŝos la eventojn en direkton favoran por la bulgara naci-liberiga movado. Tamen, sobra realisto, li estis tre malproksima de la politika aventu-

rismo, de la nepripensitaj antaŭtempaj agoj.

Levski estis flama internaciisto. Lia celo estis liberigo de la bulgara popolo elsub la kvincentjara osmana jugo. Sed li multfoje emfazis: „Ni ne persekutas la turkan popolon, nek ĝian kredon, sed la sultanon kaj liajn leĝojn — unuvorte la turkan registaron, kiu regas barbare ne nur super ni, sed ankaŭ super la turkoj mem.“

Lian apostolan laboron ĉesigis la morto — li pereis en 1873. Sed lia ofero ne estis vana — tri jarojn pli malfrue — en 1876, eksplodis la Aprila Ribelo, organizita de liaj sekvantoj.

Gia sanga frakaso altiris la atenton de la monda publika opinio al la situacio en Bulgario, provokis la protestojn de multaj eminentuloj kontraŭ la turkaj kruelaĵoj. . . Sekvis la Rusa-Turka Milito en 1877—1878, kiu fine alportis al la bulgara popolo la sopiratan liberon.

Lidia RAEVA

^{1,2} La vortoj en la citiloj apartenas respektive al Stojan Zaimov (1) kaj al Zahari Stojanov (2).

³ Ĉorbaĝio (trk) — bulgara riĉulo

⁴ Janiĉaro (trk) — turka soldato kristandevena.
Figure: kruela homo.

Ivan VAZOV

Levski

Tiu monaĥejo koron mian premas.
Tien ĉi venante, oni penti emas,
forĝesante tute pri la peka ter',
for de tentoj, pacon serĉas en mister'.
Konscienco mia tamen ekprotestas.
La sutano nigra, en kiu mi estas
kaj la monaĥej' ne repacigos min.
En la templo, se la voĉ' laŭtigas sin
himne glori Dion, kiun mi adoras,
sentas mi: Li aŭdas tiujn, kiuj ploras
en la valo de l' suferoj kaj mallum',
kaj perdiĝas preĝo mia kiel fum'
kaj kolere dorson sian turnas Dio
al la sankta kanto de la liturgio.

Paradiza pordo — ĉu en la eter'?
Kiel ĝi aspektas? — Estas ja mister':
ne kondukas tien monaĥeja ĉelo —
monda voj' pli urĝe gvidas al ĉielo,
ĉar la larmoj puraj, ĉar vidvina plor';
ĉar la ŝvitoplena plugista labor';
ĉar la vort' afabla kaj l'afero prava;
ĉar la vero sankta de animo brava;
ĉar la mano frata, milde, sen fier',
kaŝe etendita al hom' en sufer'
estas pli valoraj por la alta Dio
ol la vanaj himnoj kaj la liturgio.
Kaj mi opinias, ke sur nia Ter'
estas proksimumoj — fratoj en sufer',
kiujn la monaĥo per juro rezignis,
ĉar pli altan celon Dio al ni signis:
ke per mia barbo kaj per la sutano
mi ne povas savi de la jatagano
suferantajn fratojn. . . Ke la eklezio
ne ĉesigos ĝemon de dolora krio.

Ke nia kunhomo preĝon ne bezonas —
li kontentas, se ni helpoj al li donas;
ke ŝafisto vivas en pluv' kaj varmego,
irante konstante kun la ŝafa grego;
ke kunfratoj miaj sub jugo suferas
kaj mi pekas, se mi tion toleras;
ke mi devas jam forlasi sen dolor'
tiun monaĥejon, de la mondo for,
kaj sekrete devas vortojn novajn diri —
fratojn sklavigitajn por batal' inspiri.
Li diris — kaj iris.

Dum naŭ jaroj li
migris sen ripozo, sen dorm', famili',
sub aspekto fremda kaj sub pseŭdonimo,
preta por suferoj, kun koro sen timo,
donis li konscion, lumon por instruoj
al la blindaj sklavoj en sia patrujo.
Vortoj liaj simplaj kaj lakone sorĉaj

estis plenigitaj de esperoj dolĉaj.
Li parolis ofte pri l'revoluci',
kvazaŭ pri proksima festo de l'naci',
kvankam nekonata estis ties horo;
interesis lin nur brava, justa koro —
de l' ribelo sankta de l' popol' — soldat';
ĉiu aŭskultanto estis lia frat'.

Ĉiu aĝo, klaso, sekso kaj metio
goje partoprenis en movado tia:
riĉulo per mono; per man' — malriĉul';
kudre — junulino; mense — sciencul'.
Kaj li, malriĉulo, nur mizeron konis,
por esti utila, vivon sian donis. . .

Ĉiuloke estis li — fantom' mistera —
en preĝej' aŭ dum amuz' vespera
li aperas kaj sin kaŝas tuj sen spur'
jen pelata, jen akceptata kun plezur'.
Estis signo de alarmo lia nomo;
la polico serĉis lin en ĉies domo,
por lin kapti — „la demonon de l'epok“,
kvazaŭ ĉeestantan jam en ĉiu lok' . . .

Kaj la sem' mirinda en popola grundo
kreskis tre rapide por rikolt' abunda.
Sed denunciis lin la popo perfidul' —
por Di' — malhonor', por l'eklezi' — makul'
Sangvundita, katenita en karcero,
li suferis la torturojn de infero. . .
Vane provis la polic' en tiu lok'
venki tiun fortan koron! Plenda vok'
aŭ konfes', aŭ ĝemoj ĉe turment' infera
ne aŭdigis eĉ dum la sufer' fiera.
Morto proksimiĝis jam, sed mankis tim';
perfidvorton ne ekflustris la anim'.
Al demandoj ĉiuj — terura elprovo —
li respondis sole kun fiera movo,
deklarante: „Jen mi estas Levski, jes!“
kaj ne flustris nomojn en doloreksces'.
Por mortigi la spiriton de l'Patruj',
la tiran' al mort' kondamnis Levski tuj!

Pendumilo glora! La heroa mort'.
vin sanktigis. Estas vi la sankta sort'
kaj terura signo — de liber' simbolo —
sub vi por libero mortis la popolo.

Sankta pendumil', sur vi la mortsufero
hont' ne estis, sed glor' nova sur la Tero —
supro, desur kiu la spirit' kun ĝoj',
vidis senmortecon laŭ plej rekta voj'!

El la bulgara: Simeon M. SIMEONOV

Leciono

*Dediĉita al la 150-a naskiĝtago
de Vasil Levski*

Memoras mi instruistinojn Olja —
fraŭlino svelta kun harplektoj nigraj.
Rakontis ŝi pri vivo sklava, longa —
pri janiĉaroj kun vizaĝoj tigras.

Rakontis ŝi pri monaĥej-disĉiplo,
kiu ĵetis nigran la sutanon
kaj sin dediĉis al la emancipo,
al komplotado kontraŭ la sultano.

Vestita kiel kamparan' grandaĝa,
aŭ komercisto riĉa, bonprospera
kaŝiris li al urboj kaj vilaĝoj,
dormantojn vekis, vokis al libero.

Priskribis ŝi per emociaj vortoj
la vojon al Golgota en Sofio
kaj kiel Levski spitis al la morto
kaj brave staris sub la pendumilo . . .

La lecionon de Fraŭlino Olga
enmetis mi profunde en la koron
kaj ne forgesis ĝin ĝis aĝo olda,
por ĉiam ĝin sigelis en memoro.

Mi sekvis vojon de heroo Levski,
konspiris kontraŭ burĝa klaso fava —
en la prizono dum tri jaroj restis
kaj tie studis arton klasbatalan.
Konfliktoj armaj en montaro bolis —
pereis multaj miaj geamikoj,
sed fine kiel Apostolo volis:
„Ho, vivu senmakula Respubliko!“

La Apostolo

Titano superhoma kaj genia,
rezigis iam la monaĥsutanon
por liberigo de Patrujo sia
el kvinjarcenta jugo otomana.

Junecon sian tutan li oferis
pro sia al Patrujo am' senlima;
Pri l'venk, de la Libero li esperis
kaj tio estis lia ĝoj' subluma.

Li sciis, ke lin amas la popolo;
suferis, sed ne timis la danĝeron
kaj oni nomis lin „La Apostolo“;
la vivon riskis li por la Libero.

Animo lia estis plej modesta;
li luktis nur por la feliĉ' popola;
en sia viv' li estis tre honesta
kaj brilis lia nom' per aŭreolo.

Pro tio, ĉiam la popol' bulgara
per liaj heroaĵoj sin inspiras,
lin konsideras la bravul' plej kara,
unika sia fil', kaj lin admiras!

Al tiu Apostolo inspirita
ni riverencas el la tuta koro!
Li nun per laŭroj estas ornamita,
kronita ankaŭ per eterna glorio!

Pensoj de Levski

„Nia celo en Bulgario estas frateco kun ĉiu homo, sen diferenco de religio kaj nacieco. Ni etendas nian manon al ĉiu, kiu deziras verŝi sian sangon kune kun ni por vivo kaj libereco homa.“

„Mi promesis min mem al mia patrolando kiel ofero por ĝia liberigo — kaj tute ne por ĵariĝi Dio scias kio. Oni lasu la popolon juĝi pri mi, anstataŭ lasi min ĵari bruon pri mi mem. . .“

„Se mi sukcesos, profitos nia tuta popolo. Se mi malsukcesos, pereos nur mi sola.“

„ . . . Prizorgu la popolan laboron pli ol ĉion alian, pli ol sin mem estimu ĝin! . . .“

„ . . . Al tiaj homoj konfidu nian laboron, kiuj estas prudentaj, fidelaj kaj grandanimaj.“

„Por la Patrolando ni laboras, frato! Vi malkovru al mi miajn erarojn, kaj mi diros al vi la viajn, por ke ni korektu ilin kaj laboru kune, se ni deziras resti homoj!“

„Al miaj adeptoj mi rekomendas ne konsumi alkoholaĵojn, ĉar drinkado estas plej granda malamiko al la homaro, ĝi estas, kiu faris kaj faras multajn familiojn malfeliĉaj. Krome, ĝi estas tia malvirto, kiu malbone influas ankaŭ sur la sekretecon de nia sankta laboro.“

„Ni ekzistas en la tempo kaj la tempo ekzistas en ni, ĝi ŝanĝas nin kaj ni ŝanĝas ĝin. . .“



MALUTILAJ KUTIMOJ

Pri kio temas? Pri la grandega socia malutilo — tabakfumado kaj konsumado de alkoholaĵoj.

Mi skribas tiujn liniojn ne por altiri la atenton de fumantoj kaj drinkantoj. Ili ne ŝatas legi similajn materialojn, ĉar ili el propra sperto komprenas la malutilon de la tabakfumado kaj drinkado. Al ili mankas ne tiurilataj konoj, ĉar sur sia propra dorso ili spertas ĉiujn „bonaĵojn, kiuj venas rezulte de tiuj danĝeraj kutimoj. Ili pli bone ol la ceteraj personoj scias, kiom kostas al ili tiuj pereigaj ĝuoj. Al ili simple mankas volo rezigni la tabakon kaj la alkoholon, venki tiujn kutimojn. Ja kiu pretas deklari sin ulo kun malforta volo? Ne malofte tiuj uloj estas personoj kun grava socia posteno: administraj kaj ekonomiaj agantoj, komsomolaj kaj aliaj sociaj funkciuloj, gepatroj, instruistoj, ĵurnalistoj kaj kuracistoj — personoj, kiuj devas prezenti pozitivan ekzemplon. Tre malofte oni povas aŭdi de ili iun memkritikan vorton: ja ili devas gardi sian aŭtoritaton! Ili por tiu celo havas milojn da „teorioj“ pri „utilo“ de tabakfumado kaj de drinkado. Tial geknaboj jam en tre frua aĝo (eĉ 12-jaruloj), por pruvi ke ili sentas sin formiĝinta personeco, ke ili ne plu estas infanoj, por pruvi sian „virecon“, la knabinoj — sian emancipiĝon — demonstracie fumas kaj drinkas en publikaj lokoj prefere fortajn, „prestigiajn“ alkoholaĵojn, kvankam tio nepre reflektas sur ilian sanon kaj la buĝeton de la gepatroj aŭ sur iliajn stipendiojn. La intelektuloj (instruistoj, teknikistoj, inĝenieroj, ĵurnalistoj, verkistoj, poetoj k.s.) tute serioze „pruvas“, ke la fumado kaj la drinkado helpas al ili malaltigi la mensan streĉitecon kaj donas al ties intelektan laboron plian stimulon. . . Kontraŭe, la laboristoj, plenumantaj pezan, nemekanikigitan laboron, ordinare „ripozas“ po dek minutoj ĉiuhore, fumante cigaredon por „vigligi“ sin. Ĉiuj ĉi „herooj“ de la cigaredo kaj de la alkohola glaso ŝatas rakonti ĉu realajn, ĉu elpensitajn historietojn pri konataj maljunuloj, drinkantaj dum sia tuta vivo, tamen ĝisvivintaj altan aĝon kompare kun aliaj, kiuj nek fumis, nek drinkis, sed forpasis en pli juna aĝo. . . Kompreneble, al similaj fabloj la scienco delonge donis tute racian klarigon.

La Scienca Instituto pri Onkologio en Sofio, kiel ankaŭ aliaj similaj institutoj en eksterlando, konstatas, ke senĉese plimultiĝas la kazoj de tumorado de la supraj spirvojoj. Konsiderinda parto de ili prezentas kanceron. En nia lando ĉiujare malsaniĝas je la cititaj malsanoj ĉ. 3400 personoj, el kiuj 1600 estas estis malsanaj. Tre signifplena estas

la fakto, ke en la pasinteco tiuj personoj kutime estis 50-jaruloj, eĉ pli aĝaj, kaj nun la meza aĝo de la trafitaĵoj de tiu malsano estas 25-30 jaroj. Tre maltrankviliga estas ankaŭ tio, ke antaŭe inter ĉiuj 25-30 malsanaj viroj estis nur unu malsana virino, kaj nun — inter nur 15-18 malsanoj viroj.

La plej ofta kaŭzo de tiuj malsaniĝoj estas la tabakfumado kaj la drinkado, kiuj malbone efikas ne nur sur la fumantojn kaj la drinkantojn mem, sed ankaŭ sur la personojn, kun kiuj ili loĝas aŭ laboras en komuna ejo.

Se ni farus kalkulon por periodo de dek jaroj, ni konstatos, ke novaj 34 mil personoj malsaniĝos pro tumoroj kaj kancero. Krom la personaj suferoj kaj tragedioj, kiom da objektivaj malfavoraj konsekvencoj fontas el tio!

Oni devas pligrandigi la elspezojn de la ŝtato por konstruado de novaj malsanulejoj kun multekosta aparataro kaj specialigita personaro. Forlasas la vicojn de la laborkapablaj homoj miloj da laboruloj en sia plej produktiva aĝo. La ŝtata buĝeto ŝarĝas sin per aldonaj elspezoj por pensioj. Se oni kalkulus nur po dek minutojn por fumado de minimume dek cigaredoj dum unu labortago, oni konstatus perdos de plena laborhoro, kio malbone reflektas sur la produktivecon de la laboro en la entreprenoj. Se oni kalkulus en la skalo de la tuta lando, oni povus konstati, ke estas misuzataj milionoj da laborhoroj ĉiutage.

Pro la uzado de alkoholaĵoj kreskas la nombro de krimoj, de aŭtokatastrofoj, la nombro de mortigitoj aŭ kripligitoj, de huliganaĵoj k. a. Ankaŭ ĉi-kaze la statistiko prezentas terurajn ciferojn. Kaj por la kuracado, administra personaro, juĝista aparato, milico ankaŭ estas necesaj ne malmultaj financaj rimedoj.

La bildo, kiun mi prezentas surbaze de sciencaj esploroj, estas tamen ne plena. Sed eĉ tia, ĝi povas pensigi ĉiun patrioton.

Tial la konscienca partopreno en la batalo por elimino de la kaŭzoj de tabakfumado kaj konsumado de alkoholaĵoj estas grava tasko de ĉiu civitano de nia lando.

Al nia socialisma socio pli decas sobra vivmaniero ol simila amasa fiuzo de ĉiufanke kaj rekte malutilaj produktoj, kiaj estas la tabako kaj la alkoholo en ĉiuj iliaj formoj.

La esperantistaro ne manku en la vicoj de la konsciaj batalantoj por sana vivmaniero.

N. BOGDANOV

VERKISTO-ESPERANTISTO



(PELIN VELKOV
— 80-jara)

La tuta verkaro de Pelin Velkov estas plena de civitana kuraĝo kaj humaneco. Dum la 30-aj jaroj multaj niaj verkistoj rilatas kun simpatio al Esperanto, kaj iuj el ili (Svetoslav Minkov, Pavel Vejnov) notas ĝin kiel socian fenomenon en siaj verkoj, sed unua Pelin Velkov tuŝas E-temojn en sia verkaro („Zelenite bratja“, 1938).

Pelin Velkov naskiĝis en v. Rogozen, Vraca-distrikto. Gimnazion li finis en Vraca, poste studis medicinon kaj diplomigis en 1940. Tamen tutan vivon li okupiĝas pri belliteraturo kaj publicistikio. Sur la literatura kampo Velkov komencas labori, kiam la eĥo de la ŝtormaj tagoj de la Septembra Ribelo 1923, en kiu li partoprenas kiel komsomolano, resonas al la eventoj en 1925. La sciama junulo intense memklerigas sin, lernas Esperanton. Komence de la 30-aj jaroj li kunlaboras al la progresema bulgarlingva kaj Esperanta gazeto. La cirkonstancoj devigas lin uzi multajn pseŭdonimojn (Alen, Kalin Gavrilov, D. Dinamov, F. Molotski, F. Pelin, F. P., F. k. a.). Homo kun vigla socia konscio, li estas legeja aganto, aktiva esperantisto, tradukanto kaj preleganto. Arestata kaj malbontraktata de la polico, li tamen venkas la obstaklojn kaj ĉiam estas sur sia posteno. Aperas libro post libro, kaj ankaŭ tradukoj. Liaj rakontoj kaj satiraĵoj, kolektitaj en la bulgarlingvaj libroj „Zelenite bratja“ (La verdaj fratoj), „Stālba do nebeto“ (Ŝtuparo ĝis la ĉielo), „Kuče vlači (Hundo trenas) k. a., estas la plej karakterizaj en lia verkaro por plenaĝuloj. Ili malkovras la grandan amon de la aŭtoro al la homoj, kuraĝan defendon de l'vivo kaj estas skurĝo kontraŭ la malperfektaĵoj. El ili fontas viviga humuro.

Velkov fervore kunlaboras al la periodaĵoj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio dum la periodo 1929—1934, kiuj laŭ spirito kaj enhavo, laŭ lingvaĵo kaj temaro, laŭ la viktimoj, kiujn donis el sia medio la eldonistoj, redaktoroj, kunlaborantoj kaj legantoj de tiuj gazetoj, vicigas ilin inter la proletaj kaj kontraŭfaŝismaj bulgarlingvaj periodaĵoj, per kiuj la Bulgara Komunista Partio kaj la amasaj laboristaj organizaĵoj ĉe ni edukis la laborulojn kaj preparis ilin al aktivaj klasbataloj. Pelin Velkov kontribuas ĉefe per originalaj rakontoj kaj prozaj tradukoj plej regule en gazeto „Balkana Laboristo“. Li verkas ankaŭ alispecajn materialojn, pri kio atestas la kontribuado „Vasil Levski“ en n-ro 5—6/1930 de gazeto „Balkana Laboristo“. Ĝi aperas okaze de 57-jariĝo de la mortigo de nia nacia heroo. Velkov verece prezentas la imponan figuron de Vasil Levski kaj faras valorajn sugestojn por tiu tempo: „La idealoj, por kiuj batalis Levski, ankoraŭ ne estas efektivitigitaj. Levski batalis por sankta kaj pura respubliko, en kiu la rajton de la forto oni an-

stataŭigu per vera kaj justa libero, frateco kaj absoluta egaleco inter ĉiuj nacioj. Jen la testamento de Levski — la sentima kaj modela revoluciulo. Ni efektivigu ĝin!“

Sed la plej grava en la literatura agado de Pelin Velkov estas lia kontribuo al la belliteraturo por infanoj kaj adoleskantoj. Kiel multaj aliaj verkistoj, ĉe la malfacilegaj kondiĉoj de cenzuro tiutempe, li turnas la okulojn al la infanoj, kiuj transprenos la pezon de l' morgaŭa tago. La infanoj devas kreski sanaj, spirite fortaj, plenaj de kredo je la beleco de la nova vivo ĉe socialisma sociordo. Por ilia impeta evoluo Velkov dediĉas multajn fortostreĉojn. Liaj libroj „Cana Māzelana“ (Cana Mallaborema), „Sārdit Petko“ (Kolerita Petko), „Lisica Doktorica“ (Vulpino Doktorino), „Spasitelnijat ostrov“ (La sava insulo) k. a. estas valoraj donacoj por la infanoj. Kune kun la libroj de aliaj verkistoj ili postlasis vivigan humidon en la infanaj animoj, por ke tie elkresku la firmaj ĝermoj de la l'libero.

Post la popolvenko je la 9-a de Septembro 1944, Pelin Velkov 20 jarojn laboras kiel ĉefredaktoro kaj direktoro de Ŝtata Eldonejo „Narodna Kultura“ (Popola Kulturo). Li plu streĉas siajn kreofortojn. La junaj legantoj ĝoje akceptas liajn romanojn „Zagadāčnijat vrāh“ (La mistera pinto) kaj „Dvama v pešterata“ (Du en la kaverno). Velkov tradukas multajn romanojn, rakontojn kaj teatraĵojn de rusaj kaj sovetaj aŭtoroj: A. S. Novikov-Priboj, M. Gorkij, M. M. Prišvin, I. Ilf kaj E. Petrov, A. Fadeev k. a.

Okaze de la 80-jariĝo de Pelin Velkov ni bondeziras al li bonan sanon kaj fortojn por riĉigi nian literaturon per novaj verkoj, kiuj emociu la legantojn per sia vereco kaj socialisma humaneco.

Evgeni GEORGIEV

FAVORATO DE LA PUBLIKO



(ANANI ANEV
— 80-jara)

Duonjarcenton sur la scenejo, pli ol 250 roloj, partopreno en ĉirkaŭ 20 filmoj, reĝisorado kaj surscenigo de 34 teatraĵoj — tio sufiĉas por prezenti la riĉan artistan vojon de la aktoro el la Ŝtata Muzika Teatro Anani Anev, kies vivo kaj krea sorto ligiĝas en vera harmonio.

Komencinte sian aktoran agadon jam en 1936, en la trupo de la eminenta reĝisoro Matej Ikonov, Anev elkreskas profesie kaj ideologie sur la scenejoj de la proletaj dramaj teatraĵoj „Teatār za naroda“ („Teatro por la popolo“), „Nov svjat“ („Nova Mondo“) k. a., sur la Podio de laboristaj amuzvesperoj.

Kiel aktoro en la fronta teatro „Tribuno“ ĉe Unua Bulgara Armeo li partoprenis en la Patrolanda Milito.

Post la venka 9-a de Septembro 1944 Anani Anev arde kaj inspirite sin dediĉas al stabiligo kaj evoluigo de la bulgara socialisma teatro. Lia sindona laboro, alta profesia kaj civitana honesteco, lia talento de organizanto manifestiĝas dum lia agado en la Asocio de Bulgaraj Aktoroj, kiel direktoro de la ŝtataj teatroj en Sumen kaj Trojan, kiel vicdirektoro de la Ŝtata Muzika Teatro en Sofio. Sed tamen Anev estas plej intime ligita kun la teatra scenejo, li kreas rolojn kun psikologia kaj fizika karakterizo, kun natura homeca varmo aŭ necesa severece.

Pro sia kvindekjara teatra kaj socia agado Anani Anev estas distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ I-a grado, per „Ordeno pri partopreno en la Patrolanda Milito“, jubilea medalo „25 jaroj de post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario“, per orumita pordonardo fare de la ministro de la Popola Defendo, per honoraj insignoj ka.

Esperanton li lernis en urbo Radomir en 1931 kun instruisto Marin Jordanov.

Anani Anev estas unu el la kreintoj de la Bulgara Esperanto-Teatro (BET) en 1958, partoprenas en deko da ĝiaj spektakloj ĉe plej altaj forumoj: en naciaj kongresoj de BEA, 12 internaciaj kongresoj de Esperanto, 4 — de TEJO. Kvar fojojn li kun siaj kolegoj estis ŝatata gasto sur la kongresa scenejo de IFEF.

Ofte li estas inter junaj esperantistoj en laborbrigado, en la artaj programeroj de la Festivaloj de E-Parolo kaj Kanto.

Li estis la preleganto dum la sukcesplena turneo en 1981, en GDR kaj Hungario, okaze de 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato.

Li estas ministro Baltov en „Casantoj de oficoj“ de Ivan Vazov, Ĉubukov en „Edziĝpropono“ de Ĉehov, Peter en „Familiaj problemoj“ de M. Talvest.

„Aparte menciindas B. Beleva kaj A. Anev“ — el la kongresa bulteno, 1966. „Sur la scenejo denove dominis Anani Anev, sendube la plej bona el la kolekto de la bulgaraj aktoroj („Heroldo de Esperanto“, 1-a de septembro 1966).

Li estas Smirnov en „Urso“ de Ĉehov, Bernard Shaw en „Kara mensogulo“ de Jerome Kilty.

„Ni povas admiri, kiel Anani Anev per simpla ŝanĝo de sintenado kapablis iom post iom maljuniĝi...“ (Claude Gacond, 1972). „La entuziasmigita publiko povus forgesi la nomojn de la du bulgaraj geaktoroj, sed en ĝia animo restos la rememoro pri ilia arto kaj la nomo de Bulgario. (Delegito el Svedio, IFEF, 1972).

Multfoje Anev estas Miŝa en nia ŝatata skeĉo „Divorco“ de N. Slonova, Alberto en „La rozoj“ de A. de Benedetti, Lisickov en „Akridoj“ de St. L. Kostov, Stanĉo en „Dio absolvu“ laŭ Elin Pelin, Maslarski en „La milionulo“ de J. Jovkov, Rodion Nikolajevič en „Malnovmoda komedio“ de Al. Arbuzov.

Kaj ĉiu sceneja figuro estas kreita inteligente, varme respondeplene.

Lian 25-jaran teatran agadon en Esperantujo oni celebris en Budapeŝto, dum la UK en 1983 kaj aŭtune de la sama jaro — en Sofio.

Pri lia kontribuo al la E-kulturo Anani Anev estis distingita per la Ora Insigno de BEA.

Belka BELEVA

A. PETROV

AL FAMA E-AKTORO

Akrostike al Anani Anev

Aktoro glora, tre elstara,
Ne forgesigos vi, ho, kara;
Animojn niajn emociis,
Noblecon Esperantan sciis,
Internacie vi roladis,
Aktive vi movad-agadis,
Novigis verdan artistecon,
Esperantigis bel-edzecon,
Vi brila ĝoju post dumila!

In memoriam



KARMEMORA POETINO

La 12-an de februaro 1987 en sia 80-jara aĝo forpasis la konata bulgara esperantistino Ljuba Bojaĝieva (naskita en Jambol en 1907).

Fininte la kurson de la Sofia Konservatorio, dum kelkaj jaroj Ljuba Bojaĝieva estis profesorino de muziko.

La plej utila laborokupo por Bojaĝieva estis ŝia instruado en la Sofia Instituto de Infanedukistinoj, kie ŝi havis la eblon konatiĝi kun la bulgara porinfana literaturo, kaj precipe kun la porinfana poezio. Por la bezonoj de la edukistinoj ŝi komponis multajn porinfanajn kantetojn, kiujn ŝi eldonis en tri kantaronoj.

Sian socie utilan laboron Ljuba Bojaĝieva finis en la Bulgara Radio, kiel respondeca redaktoro en la muzika fakto.

Esperanton ŝi lernis post sia pensiĝo, kvankam tiu lingvo delonge ŝin allogis kaj ravis per sia belsoneco. Baldaŭ ŝi akiris sufiĉe da lingvokonon, kiuj ebligis al ŝi membriĝi al la Sofia Literatura Rondo ĉe BEA. En tiu amike bona medio ŝi komencis verki rakontojn kaj poeziaĵojn, interalie ankaŭ porinfanajn versaĵojn, kies granda parto estis presitaj en revuo „Bulgara Esperantisto“, en „Juna Amiko“ k. a. En 1980 kolekto de ŝiaj porinfanaj versaĵoj aperis libroforme sub titolo „Floranta Branceto“ (Poezio kaj prozo por infanoj. (Aŭtoro de la prozaĵoj — Mihail Ĉobanov.))

Ljuba Bojaĝieva havis intereson ankaŭ al la bulgara folkloro, kiel poetino kaj muzikistino. Dum la lastaj jaroj ŝi multe laboris por la elekto kaj traduko en Esperanton de kelkdeko da belaj popolkantoj, kiuj aperis en 1986 sub titolo „Bulgaraj popolaj amkantoj“. Nun antaŭstaras apero de dua volumo, kiun, bedaŭrinde, la talenta tradukistino ne ĝisatendis.

Kliniĝon antaŭ ŝia kara memoro!

Asen JOSIFOV

FUNEBRA ADIAŬO

Al Ljuba Bojaĝieva

Viv' via trabilis sur altnivel' kanta,
ĉe verdaj brancetoj, florar' nevelkanta,
lilioj, lekantoj, abioj, kratagoj,
sub kiuj nin logas bonguste la fragoj.

Ho, jen najtingala birdarsimfonio:
alaŭdo, paruo, paser', cikonio,
garoloj, kornikoj, pirolaj, la pigo...
flutado, trilado, fajfad' sen ordigo.

Nin ĉarmas la bela debutrakontaro,
ciklet' de prilanda vojaĝ-impresaro;
ravageas l' animojn junkoraj versaĵoj
pri mondo la faŭna kaj floroj, verdaĵoj.

Vi vivos plu muze, poeme en koroj,
ĝis kiam nin ravis printempo kaj floroj.

NIA INTERNACIA AGADO

Riĉa estas la internacia agado de la esperantistoj el la urboj Gălăbovo, Kazanlâk kaj Stara Zagora. Ili havas korespondamikojn en multaj landoj de la mondo. Per leteroj, broŝuroj, revuoj kaj personaj kontaktoj kun alilandanoj ili informas pri la sukcesoj de nia socialisma lando, pri la bonstato de nia popolo en la materiala kaj spirta sfero.

La esperantistoj el Gălăbovo subtenas regulajn kontaktojn kun siaj leteramikoj el USSR, Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Svedio, Japanio, Svislando k. a.; iliaj kolegoj el Stara Zagora — kun GDR, Meksiko, Pollando, USSR, Anglio, Francio, Hispanio, Alĝerio, Portugalio.

Al niaj alilandaj amikoj ni sendis donace multajn librojn kaj broŝurojn, eldonitajn en Esperanto ligite kun gravaj datrevenoj: 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, 60-jara datreveno de la Septembra Ribelo 1923, 40-jara datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario.

30 ekzemplerojn de la broŝuro „La paco kaj la sindikatoj“ de Petăr Djuĝerov ni sendis al esperantistoj en Japanio, FRG, Meksiko, Urugvajo, Argentino, Venezuelo kaj aliaj landoj. La internacian agraran bultenon „Agrobulteno“, eldonatan en Stara Zagora, ni disvastigas en 30 landoj de la mondo.

S-ro Inger Palerhag el Svedio skribis al la esperantistoj el Gălăbovo, ke iuj el la materialoj pri la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, senditaj al li, estas tradukitaj en la svedan lingvon kaj ke li organizis lecionojn pri temo „La kultura, ekonomia kaj politika vivo en Bulgario“.

**En siaj lastaj n-roj „Bulgara Esperantisto“ publikigis kelkajn pecojn el la verko de prof. Mizuno — Noto de la Red.*

Dank' al Esperanto infanoj el la Junpionira Domo en Stara Zagora partoprenis per siaj pentraĵoj en la internacia ekspozicio en urbo Osako, Japanio. Ili prezentis sin tre bone, parto de iliaj pentraĵoj estis premiitaj. Ni ricevis dankleterojn el Hispanio — el urbo Moja, denove lige kun la partopreno de niaj infanoj en ekspozicio de pentraĵoj, organizita tie.

Bonaj estas la kontaktoj de niaj societoj kun societoj el la ĝemelurboj Kujbiŝev (Sovetunio) kaj Koŝice (Ĉeĥoslovakio).

Multaj alilandaj esperantistoj vizitis siajn amikojn en Gălăbovo, Stara Zagora kaj Kazanlâk, ĝuis ilian gastamon, veturis tra Bulgario. F-ino Fukiko Mashimo, instruistino el Japanio, post sia gastado en nia lando, antaŭ ol forveturi, deklaris: „Mi venis Bulgarijon kun certa timo, pro la gazetara propagando en Japanio kontraŭ socialismaj landoj. Sed mi mem povis konstati, ke la bulgara popolo vivas feliĉe en sia belega lando.“ Reveninte Japanion, f-ino Mashimo aranĝis en sia lernejo malgrandan ekspozicion pri Bulgario.

S-ro Keyichi Sasamori, pedagogo, kun kiu mi konatiĝis en Tokio, deklaris, ke li nepre ellernos Esperanton, por povi viziti Bulgarijon kaj de proksime konatiĝi kun la konstruado de socialismo. Tiutempe s-ro Sasamori havis entute eraran imagon pri la socialisma socio. S-ro Sasamori efektive ellernis Esperanton tre rapide kaj en 1983 gastis al ni. Li multe veturis tra Bulgario. Li vizitis la Rila-monaĥejon, Vitoŝa-monton, kelkajn el niaj grandaj nigramaraj ripozlokoj, estis en Rodopi-montaro. En Pazarĝik-distrikto, dank' al la kontribuo de Petko Arnaudov, li vizitis la Agraran-Industrian Komplekson „APK-Sever“ — la kooperativajn fruktĝardenojn, la rizkampojn, la bestbredejojn, kelkajn vilaĝojn. S-ro Sasamori havis la eblecon renkontiĝi kun administraj kaj partiaj funkciuloj, kun gvidantoj de

BEA — kamaradoj Hristo Gorov kaj Nikola Aleksiev, kun la redakcianoj de revuo „Bulgara Esperantisto“. Siajn bonajn impresojn s-ro Sasamori esprimis sur duonpaĝo de japana gazeto, en artikolo ilustrita per 8 koloraj fotoj. Kopio de tiu gazeto estis disponigita al la Bulgara E-Muzeo. Post interparolo kun la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ D. Hitrov, li proponis al la redakcio grandan artikolon kun siaj impresoj pri Bulgario. La artikolo estis publikigita en la revuo en 1984.

Prof. Yoshiaki Mizuno el la universitato „Meiji“, kiu oficvojaĝis tra Eŭropo kaj kiu estis elektinta la studtemon „La lingva situacio en Eŭropo kaj la eblecoj de Esperanto“, gastis en nia lando 22 tagojn. Dum tiu tempo li havis eblecon ĉeesti multajn E-aranĝojn. En „Suna Bordo“ li salutis la 36-an Internacian Kongreson de Fervojistoj-esperantistoj, lin intervjuis ĵurnalisto el la Sofia Radio, dum 10 minutoj li parolis por la bulgaraj aŭskultantoj pri siaj impresoj pri Bulgario kaj pri la devo de sciencistoj por konservado de la monda paco. S-ro Mizuno havis renkontiĝon ankaŭ kun reprezentantoj de CE de BEA.

Post sia reveno en Japanion prof. Mizuno verkis en japana lingvo 250-paĝan libron pri siaj impresoj dum la vojaĝo tra Eŭropo. Tuj poste li preparis 100-paĝan E-version de sia verko, en bonega Esperanto.*

Jen, tute koncize, kelkaj rezultoj de la internacia agado de la Distrikta E-organizaĵo en Stara Zagora. Sen pretendi, ke mi tuŝis ĉiujn flankojn de la traktata problem, mi nur aldonus, ke ni ĉiam ankoraŭ estas ŝuldantoj al la junularo tiurilate.

Petko BONEV,
prezidanto de DE de BEA —
Stara Zagora

VIZITU SLOVAKIAN PARADIZON!

Turisma semajno (TUSE) okazos tradicie en Slovaka paradizo, proksime de Spišská Nová Ves inter la 18-a kaj 24-a de julio 1987.

Loĝado en 2–4-litaj ĉambroj en turismaj domoj, mangado — en kampadejo. En la programo estas piedekskursoj, 2 tuttagaj perbusaj ekskursoj al historia urbo Levoča, Altaj Tatroj kaj Glacia Groto, amuzvesperoj, konkursoj, k. a.;

Kotizo: 810 kaj 930 Kčs, laŭ kategorio.

Specialaj premioj por partoprenantoj, kiuj parolas nun Esperanton!

Pliajn informojn donas kaj aligilojn akceptas:

František Nikodem, Partizanka 3, Spišská Nová Ves, CS-052 01, Ĉeĥoslovakio.

EKSPOZICIO ORGANIZOTA

Esperanto-societo „Kolombo de la paco“, u. Gălăbovo (Bulgario) organizas meze de aprilo ĉ. j. ekspozicion, dediĉitan al la 100-jariĝo de Esperanto. Ni petas la tutmondan esperantistaron sendi al ni diversajn materialojn: malnovajn eldonaĵojn; afiŝojn, fotojn de la unuaj Esperanto-pioniroj kaj de mondkalaj agantoj de la movado, suvenirojn. Ĉiujn materialojn bonvolu sendi al: 6280 Gălăbovo, str. „Stara Planina“ 12, por Esperanto-societo „Kolombo de la paco“.

KUNLABORO KUN BEJ? JES, VOLONTE!

Li: Via popolo estas simpatia...

Ŝi: Ni admiris vian naturon, la belajn urbojn kaj lokojn, kiujn ni sukcesis viziti dum du semajnoj: Sofio, Plovdiv, Varna, Ruse, Provadia, IEK-Pisaniĉa, Rila-monaĥejo. Kaj ĉie ni trovis esperantistojn!

Ili renkontis esperantiston eĉ en Rila-monaĥejo — la ĉiĉeronon Ljubomir Kosev. Li posedas francan, germanan kaj rusan lingvojn, sed eksciinte, ke la junaj alilandanoj estas esperantistoj tuj ekparolis Esperante. Fakte Ljubomir unuafoje havis la okazon paroli en Esperanto, sed laŭ opinio de la eksterlandanoj lia unua provo estis sukcesa. Tiel li konatiĝis kun Marianne Lund kaj Claude Rouget. Si estas 20-jara norvegino, kiu studas en slava fakoj de la Universitato en Oslo kaj estas prezidantino de la junulara E-sekcio en sia lando. La 27-jara Claude estas instruisto en elementa lernejo kaj samtempe studas sociologion kaj ekonomikon en la Universitato de Caen. Li estas estrarano de la junulara franca E-organizaĵo (JEFO). Ambaŭ estas esperantistoj — depost ses jaroj kaj volonte akceptis la inviton rakonti pri la vivo kaj aktivado de la E-junularo en siaj landoj.

Marianne diris, ke en Norvegio la nombro de la esperantistoj estas malpli granda ol ĉe ni — proksimume 500 personoj, kune kun la junuloj, en la tuta lando.

Claude sincere rakontis:

— La franca junulara E-movado nombre ne kompareblas kun la bulgala. Ni havas proksimume 100 membrojn. Lastatempe ni devis ŝanĝi la statuton de JEFO,



Marianne Lund kaj Claude Rouget (ambaŭ dekstre) kun la bulgaraj esperantistoj Dimitar Hristov (meze) kaj familio Velurina kaj Emil Ĉirpanski.

Foto: la aŭtorino

por ke la asocio ne restu sen estraro: ĉiuj niaj estraranoj jam alproksimiĝas al la aĝo de 26 jaroj, iuj estas eĉ pli aĝaj, kaj ne estas kandidatoj por gvidantoj de la junulara movado. Do, nun la limago por junaj gvidantoj estas 30 jaroj. Ne disponeblas pli monrimedoj, JEFO ne povas grandskale varbi ankaŭ pro tio, ke neniu oficiala instanco nek medio (radio, TV, gazetaro) apogas Esperanton. Por informi la junajn E-komencan-

La olivbranco simbolas pacon

(Daŭrigo de n-ro 3/87)

LA SUPRON DE LA MONTETO LIKAVITOS

vi povus atingi piede aŭ per kablotrajno kaj de tie admiri la brilan blankecon de la greka ĉefurbo. Parto de ĝiaj konstruaĵoj estas el marmoro, akirata de la proksima altaĵo Pendeli, aliajn domojn kaj oficejojn oni farbis en la koloro de nego, kiu en tiu sudorienta lando ne estas tiel ofta gasto. De Likavitos vi vidos multajn industriajn entreprenojn, la bulvarojn kaj stratojn ŝtopitajn de aŭtoj (ilia nombro atingis du milionojn). Pro tio la atenanoj (jam proksimume kvar milionoj) rajtas konduki siajn aŭtomobilojn en la urbocentro nur ĉiun duan tagon — ekz. en unu tago rajtas veturi aŭtomobiloj, kies numeroj finiĝas per para cifero, kaj en la alia tago — tiuj kun malpara cifero. Sur la mallargaj stratoj estas ĉiutaga obstrukcio de la cirkulado, sed eble plej ofte oni povas vidi tion sur la t. n. virina

strato „Ermu“. Ĉi-tie troviĝas multaj magazenoj kun porvirinaj varoj kaj iuj atenaninoj preferas rigardi la allogajn vitrinojn kondukante siajn aŭtojn. La aliaj ŝoforoj koleras, primokas ilin, sed vane... la virina kutimo restas.

De Likavitos via rigardo eble serĉos la centron de moderna Ateno — la placon „Sindagma“ (Konstitucia). Sur ĝi estas la greka parlamento — iama reĝa palaco, antaŭ kiu en 1843 la kunveninta popolo kriis: „Konstitucio, konstitucio!“ Ektiminte la popolan ribelon, la bavara princo Oton donis al la grekoj konstitucion.

Certe viaj okuloj dezirus vidi ankaŭ la koron de la urba komerca vivo — placon „Omonia“; straton „Akademias“, kie en najbareco situas sciencaj institutoj, la Universitato, la Scienca Akademio kaj la Nacia Biblioteko. Proksime estas la Supera Politeknika Instituto, antaŭ kiu en 1973 studentoj batalis kontraŭ la seĝpara milita diktaturo en Greklando. En la sama jaro, la

30-an de julio, per referendumo, de monarĥio Grekio estiĝis parlamenta respubliko kun prezidanto.

Hodiaŭ la greka registaro strebas subteni pacajn kaj amikajn rilatojn kun la aliaj landoj, inkluzive ĝian nordan najbaron — Bulgario. Sed ne nur politikistoj difinas la ligojn inter la popoloj — ankaŭ la popoloj mem zorgas pri tio. Ni — bulgaroj, sentas nin en Greklando inter amikoj. Ĉie — en muzeoj, vendejoj, surstrate — la grekoj ĉiam ridetas afable ĉe renkontigo kun bulgaroj. Sendube, tiun intiman rilaton ni bulgaraj esperantistoj ankaŭ ĝuis.

EN SAMIDEANA MEDIO.

Dum nia restado en Ateno la gastamaj dommastroj invitis nin viziti ilian E-klubon. Ĝi troviĝas en granda apartamento sur centra strato „Agiu Meletiu“ numero 54. Ĉi-tie nin atendis membroj de HEA ĉe-kape kun la asocia estraro. Oni regalis nin per grekaj manĝaĵoj kaj vino kaj ni eksciis multajn faktojn pri la historio kaj nuna stato de Helena Esperanto-Asocio el la rakontoj de s-ino Maria Pontika — prezidantino de HEA, kaj s-roj Kostas Kiriakos — vicprezidanto, kaj Spiros Sarafian — ĝenerala sekretario.

Maria PONTIKA:

— Ni kreis jubilean komitaton, kies tasko estas organizado de nia propaganda poresperanta laboro dum 1987. Per konvenaj prelegoj jam multaj homoj estas informitaj

tojn en lokaj kluboj, ke junulara E-asocio ekzistas kaj pretas respondi al „junecaj“ demandoj, JEFO starigis delegitan reton. Antaŭe lokaj kursgvidantoj ofte forgesis menciiri al siaj junaj lernantoj pri la ekzisto de JEFO. Ĉiu JEFO-ano ricevas dumonatan bultenon kaj rajtas publikigi en ĝi ĉiuspeciajn kontribuojn.

JEFO povas arangi ĉiujare almenaŭ du internaciajn kunvenojn. Bedaŭrinde, ĝis nun neniu bulgario partoprenis niajn renkontigojn. Ĉu eblas baldaŭ kunlaboro inter BEJ kaj JEFO? Jes, volonte!

Mi konatigis kun Marianne kaj Claude tute hazarde kaj parolis malmulte. Sed mi opinias, ke tiu kontakto sufiĉas, por ke ni konstata, ke eventuala kunlaborado inter BEJ, JEFO kaj junaj esperantistoj el Norvegio estas interesa kaj perspektiva afero.

Maria BOJAĜIEVA

ĈU LA UNUA HIRUNDO?

La 12-an—14-an de majo 1957 en Sofio kunsidis la Supera Instrua Konsilantaro. Stojko Siderov, tiama estro de fako „Popola Klerigo“ ĉe la Distrikta Popola Konsilantaro — Veliko Tŕnovo, faris unu proponon kaj unu sciigon. Li insistis pri fakultativa instruado de Esperanto en la lernejoj kaj samtempe informis, ke tio jam estas fakto en Polŝi Trâmbeŝ (ĵ. „Uĉitelŝko delo“, N-ro 41, 1957).

Vere, en la lernejoj 1956/57 en nia gimnazio komenciĝis regula nedeviga instruado de Esperanto. La instruhoroj trovis lokon en la oficiala semajna programo, egalrajte kun la aliaj lernobjektoj. Kun konsento de la supre menciita fakestro ili estis pagotaj. Tamen la tiamaĵ instruistoj utiligis la decidon nur kiel propagandilon kaj rifuzis ricevi pagon.

Eble tiu fakto estas la unua hirundo de la lerneja Esperanto-instruado en nia lando.

Kaj dum la sekvintaj jaroj ĝi estiĝis tradicio. La posta decido de la Ministerio de Popola Klerigo pri fakultativa instruado de la Lingvo Internacia trovis en mezlernejo „9-a de Septembro“ la terenon delonge preta kaj senproblema.

En oktobro 1957 aperis la unua numero de la internacia lernanta gazeto „Grajnoj en vento“ rondo XI), eldonata kaj presata en Polŝi Trâmbeŝ en Esperanto dum kelkaj jaroj. Ĝi havis kunlaborantojn el USSR, Francio, Japanio, Nov-Zelando, Argentino, GDR, Jugoslavio...

La junaj geesperantistoj kaj la E-instruantoj Milka Popova, Maria Nedeva-Manolova k.a. iniciatis alian gravan lernejan entreprenon—ili estiĝis fondintoj de la Klubo por Internacia Amikeco en la lernejo. Kiel modelo servis simila klubo en la sovetia urbo Minkivci, laŭ informo aperinta en „Grajnoj en vento“. La gazeto mem post sia dua kajero aperadis jam kiel eldonaĵo de la Interklubo. Ties klubejo, bone aranĝita, estis preferata loko por interŝanĝi adresojn, trafoliumi interesajn leterojn, revuojn kaj albumojn, por aŭdi bonan muzikon, organizi diskutojn. („La Bulgarie nouvelle“, No 12, 1960).

En 1957 en Polŝi Trâmbeŝ estis fondita ankaŭ lerneja terkultura laborkooperativo „Zamenhof“, kies membroj kultivis 30 hektarojn da kooperativa tero sub la gvido de la esperantistino-agronomo Veneta Boškova, („Nuntempa Bulgario“, n-ro 10, 1961).

Ideo, plano, iniciatoj... Poste iuj el ili malaktualigis, tamen restis la spuroj, la ekzemplo de la entuziasmuloj, la enradikiĝinta estimo al Esperanto, kiu daŭre vivas en la lernejo, edukante la junan generacion en spirito de interpopola amikeco kaj paco.

Hristo BELIĈENSKI

pri Esperanto kaj pri la agado de HEA. La esperantistoj vizitatis urbestrojn, invitas en nia klubejo influajn personojn, kiuj povus helpi al ni materiale kaj morale. Ĉi-jare pli ofte la grekaj esperantistoj serĉas kontaktojn kun ĵurnalistoj el la ĉefaj amaskomunikiloj, por ke ili rakontu pri la 100-jara jubileo de Esperanto kaj popularigu nian agadon. Ni komprenis, observante la praktikon de BEA, ke via agado, t.e. kunlaborado kun diversaj ŝtataj organizoj kaj aktivuloj estas tre fruktodona. Dum 1987 ni preparas la eldonadon de esperantlingvaj turismaj faldfolioj kaj aliaj materialoj pri Greklando.

Mi devas nepre emfazi la amikan kunlaboradon, kiu ligas BEA kaj HEA. Ambaŭ asocioj bone agas sur la E-kampo en kadre de Balkana Komitato. Tio validas ankaŭ por Jugoslavio. Mi esperas, ke plifortigos la E-movadojn en Rumanio kaj Turkio. En la turisma sfero BEA kaj HEA uzas plej efektive la eblecojn de Esperanto per regula interŝanĝo de grupoj. Mi multfoje estis en Bulgario kaj mi estimas ĝian laboreman popolon. La bulgario estas bonkoraj kaj gastamaj kaj mi estas konvinkita, ke niaj popoloj devas plu evoluigi siajn interrilatojn. Fine mi diros, ke ni ĉiam kore kaj sincere akceptas niajn najbarojn kaj fratojn — bulgariojn, kaj ili devas esti certaj, ke la grekoj ĉiam ĝojas esti kun ili kaj deziras labori kune kun ili.

Kostas KIRIAKOS:

— En 1926 la greka amiko de Zamenhof — Anakreon Stamatidis, fondis la Helenan Esperanto-Asociacion. Antaŭ tio, en 1906, li organizis sur insulo Samos esperantistan societon kaj sukcesis fari Esperanton deviga objekto en mezlernejo. Poste tiu pioniro de nia E-movado translokiĝis en Atenon, kie daŭrigis sian poresperantan laboron. De tiam nia asocio disvolviĝas per malgrandaj, sed fortaj paŝoj.


La nuna estraro de HEA konsistas el 7 membroj. Ankaŭ helpas al ni ankoraŭ 15 homoj. Entute nia asocio havas 200 membrojn en Ateno. Estas ankaŭ Esperanto-Ligo en Tesaloniki, kun kiu ni kunlaboras. En diversaj aliaj loĝlokoj de Greklando estas ankaŭ aliaj apartaj esperantistoj — eble proksimume 100, sed ili ne membras en HEA. Pli da esperantistoj estas en insuloj Korfu, Rodos, Kreto, kaj ni strebas organizi ilin en kadre de nia asocio.

Spiros SARAFIAN:

— Laŭ mi la kunlaborado inter BEA kaj HEA estas ideala, ĉar niaj rilatoj ne limiĝas nur inter ambaŭ asocioj, sed la ligo ampleksas la apartajn esperantistojn.

Tiuj eldiroj laŭ mi sufiĉe bone pravas la reciprokajn sentojn kaj rilatojn inter la bulgaraj kaj grekaj esperantistoj.

Mi provis prezenti al vi, estimataj legantoj, la amikecon inter bulgaraj kaj grekaj esperantistoj per mia



La Nacia Arĥeologia Muzeo en Ateno.

rakonto pri la travivaĵoj de la unuaj bulgaraj esperantistoj vizitintaj Grekion dank'al la kontrakto inter BEA kaj HEA por interŝanĝo de grupoj. Mi esperas, ke ankaŭ multaj el vi vizitos Greklandon. Kaj mi bone komprenas tiujn, kiuj jam estis tie, sed ne preterlasus la okazon denove gastari al siaj grekaj amikoj-esperantistoj, ĉe kiuj ili sentis sin feliĉaj. Grekio estas moderna lando, sed ankaŭ forte alloga per la eterna brilo de sia antikveco. Kvankam multaj monumentoj estas detruitaj de la tempo aŭ de teruraj tertremoj kaj aliaj — forŝtelitaj, Grekio tamen restas perlo de la antikva kulturo.

Do, al ĉiuj: „Bonan vojon! Kaj al niaj grekaj amikoj denove: „Dankon kaj ĝis nova renkontiĝo — sed ĉi-foje en Bulgario“

Maria JANKOVA

Pli da atento al malgrandaj societoj!

Dank' al la kreskanta populareco de la Internacia Lingvo en nia distrikto, la agado de DE de BEA — Jambol, dum la pasintaj du jaroj fariĝas pli riĉa kaj varia.

Bone disvolviĝas la rilatoj de la Distrikta Estraro de BEA kun la ceteraj publikaj organizaĵoj: Patrolanda Fronto, Komsomolo, Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo, Distrikta Konsilantaro pri Kulturo, kun leĝejoj, lernejoj junularaj domoj k. a.

Fine de 1984 DE de BEA havis 7 societojn kaj 223 membrojn kaj nun la societoj estas 12 kun 553 organizitaj membroj. En ĉiu komunumo en la distrikto (escepte de unu) funkcias Esperantaj societoj. Tion ni sukcesis atingi dank' al bona kunlaboro kun la neesperantistaj organizaĵoj.

Por plialtigi la rolon de la lokaj E-societoj kaj por plibonigi ilian organizan laboron ni akceptis plurnajn decidojn.

Pasintjare, oni vaste diskutis ankaŭ la problemojn de instruaj edukaj laboro kaj de plua kunlaboro kun la ceteraj publikaj organizaĵoj.

La Distrikta Estraro de BEA el-laboris kaj akceptis specialan programon pri la celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto. Multaj el la starigitaj taskoj estas jam realigitaj.

La Burao de DE de BEA plibonigis la stilon de sia laboro kun la

Esperantistaj societoj en la distrikto. Plimoderniĝis la planado de la laboro kaj agado, estis planitaj kaj realigitaj komunaj iniciatoj kun la popolaj amasorganizaĵoj kaj amasmovadoj. La societaj estraroj agadas laŭ jaraj kompleksprogramoj, sesmonataj kaj operaciaj planoj. En la kancelario de DE de BEA estas kartoteko de ĉiuj esperantistoj — laŭ societoj.

Dum la pasinta lernojararo DE organizis konkuradon inter la E-kursoj en nia distrikto. Dank'al la informmaterialoj dissenditaj en la komenco de la lernojararo, la kondiĉoj de la konkurado estis bone konataj al ĉiuj E-societoj, kursoj kaj al la membraro ĝenerale. La demandoj temis pri: membraro de BEA, abono al E-gazetoj, publikaj manifestigoj, ekspozicioj, internacia korespondado, kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj, partopreno en diversaj aranĝoj, organizitaj de CE kaj DE de BEA, k.a. Bonajn sukcesojn atingis la E-kursoj de societoj „Progreso“ — v. Tenevo, „M. Gorkij“ — Jambol, „Impeto“ — v. Skalica, „Flamo“ — u. Stralĝa, „Espero“ — u. Topolovgrad k.a.

Ĉefa tasko de la E-movado en nia distrikto estas la preparo de spertaj Esperanto-pedagogoj kaj propagandistoj. Bona komenco estas metita per la intensa Esperanto-kurso por geinstruistoj, organizita en aprilo pasintjare. Al la sama celo servos ankaŭ la Naciaj In-

struistaj Kursoj — okazontaj ĉi-jare en Jambol. Tiuj novaj E-lek-toroj instruos Esperanton en la malgrandaj loĝlokoj de la distrikto.

Grava momento en nia eduka laboro kun la gejunuloj estis la organizitaj renkontigoj kun aktivaj batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, partopreno en recitaloj kaj solenaĵoj, preparo kaj prezento de belartaj programoj kaj radioelsendoj en la lernejoj, kie funkcias E-kluboj. Oni ofte organizas ekskursojn, viziton de historiaj monumentoj, vidindaĵoj k.a. Multaj aranĝoj estas preparitaj kune kun neesperantistaj organizaĵoj. Bonajn rezultojn tiurilate atingis E-societoj „Progreso“ (v. Tenevo), „M. Gorkij“ (Jambol), „Ambasadoro“ (u. Boljarovo) k.a.

La E-societoj „Flamo“ (u. Stralĝa), „Espero“ (u. Topolovgrad) kaj „M. Gorkij“ (Jambol) organizis distriktajn esperantistajn renkontigojn, en kiuj partoprenis multaj esperantistoj. Estis prezentitaj belartaj programoj, organizitaj interkonaj vesperoj. La esperantistoj el societoj „Espero“, „Ambasadoro“, „M. Gorkij“, „Aŭroro“, „Sano“ (Jambol) k.a. partoprenis diversajn E-aranĝojn en GDR, Hungario, Ĉinio kaj Pollando organizitaj de la Internacia Esperanto-Kursejo — Sofio.

Dimităr HRISTOV, vicprezidanto de DE de BEA — Jambol

Instruado de Esperanto en Burgas-distrikto

Lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto DE de BEA en Burgas disvastigis la propagandan laboron por popularigo de Esperanto en la distrikto. Nia grava tasko estas la preparo de instruistoj por civitanaj kaj lernejanaj kursoj, la malfermo de E-kursoj por komencantoj.

Jen mia motivo por peti interparolon kun Elena Stojkova — prezidantino de DE de BEA — Burgas.

— Kamaradino Stojkova, kiam vi komencis la preparlaboron por la nova E-lernojararo?

— La preparo por malfermo de la lernojararo 1986/87 komenciĝis en julio 1986 per la Distrikta Plenkunsido, dediĉita al la studagado. Tuj estis organizita havigo de la necesa kvanto da lernolibroj kaj helpiloj por nia distrikto. Estis presitaj sufiĉe da propagandfolioj, kaj aŭŝoj por ĉiuj loĝlokoj de la distrikto. CE de BEA disponigis al ni la propagandan folion „100 jarojn Esperanto“. La Distrikta Estraro faris ĉion eblan por organizi ĉeeston de geinstruistoj el nia distrikto en la kursoj por lingva kvalifikado en la Internacia Esperan-

to-Kursejo en Pisanica kaj en la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj „T. Samodumov“ — Sofio.

Dum la lernojararo 1985/1986 en la distrikto funkcias 5 kursoj por civitanoj-komencantoj, nun ili estas 9. Pasintjare nur en 3 lernejoj de la distrikto oni instruus Esperanton — fakultative aŭ en studrondoj, kaj dum la kuranta jaro — en 16 lernejoj kun entute 370 partoprenantoj, en la loĝlokoj Ajtos, Burgas, Grudovo, v. Vresovo, v. Zvezdec, Kableŝkovo, Karnobat, Nesebăr, Pomori e.

— Kion faras DE de BEA por plilongigo de la kvalifiko de E-instruistoj?

— Mi havas liston de ĉiuj E-instruistoj en la distrikto. Jam en la komenco de la lernojararo DE informas ĉiun el ili aparte, kie ili povas dum la jaro plialtigi sian gradon de lingvoposedo, decidas kiujn proponi por partopreno en la kurso de la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj „T. Samodumov“ kaj en IEK — Pisanica, kiu studos foreste ktp.

CE de DE de BEA — Burgas, jam tri jarojn funkcias Distrikta Metodika Unuiĝo. Fariĝis jam la organizata en la komenco de la lernojararo de la estraro de la Unuiĝo kaj de DE dutaga distrikta pedagogia seminario en Slănčev Brjag kun partopreno de instruistoj kaj prezidantoj de E-societoj. La celo de la seminario estas: pridiskuto de la antaŭstarantaj problemoj, interkonatigo de la instruistoj, intersango de spertoj. Dum tiuj seminarioj oni akceptas planon por agado de la Metodika Unuiĝo, oni pridiskutas organizaĵajn kaj metodikajn problemojn. Ilia laboro pasas en ĉeesto

de reprezentantoj de la Distrikta Soveto „Popola Klerigo“ — Burgas kaj de la Instruista Sekcio ĉe BEA.

La lastan seminarion, (novembro 1986) partoprenis Dimo Todorov — inspektoro pri romanaj lingvoj en la Distrikta Soveto „Popola Klerigo“ — Burgas, kaj respondeculo pri studado de Esperanto en la lernejoj, kaj Marin Bacev — metodikisto en la Instruista Sekcio ĉe CE de BEA. — Estis pridiskutitaj: teoriaj kaj metodikaj demandoj, ekz. praktika ekzercado „Lernado de didaktikaj ludoj“, specifaj mo-

mentoj ĉe la uzado de la prepozicioj „de“ kaj „al“; demandoj rilate la enskribigo de kurantaj trimestraj kaj jaraj notoj pri E-scio en notlibroj kaj diplomoj de personoj fakultative lernantaj Esperanton k. a. Ni kun M. Bacev vizitis lecionojn de Smaragda Janeva, instruistino de Esperanto en la mezlernejo „G. Dimitrov“ — Pomorie, kaj de E. Enev — lektoro de Esperanto en civitana kurso en Burgas k.a.

— Kiel la instruistoj akceptas tiujn vizitojn?

— Nature, ĉiu lektoro emociigas kaj konfuzigas, kiam la kurson vizitas fremda homo. Sed tio ne timigas niajn lektorojn, male tio estas signo de rekono kaj ebleco plialtigi la aŭtoritaton de la E-societo, de la lernejana klubo. Kaj por ili tio estas tre grava, ĉar ili ĉiuj estas aktivuloj de la societoj. Kiel modelajn lektorojn ni povas montri Smaragda Janeva el Pomorie, Janka Ilieva el Karnobat, E. Enev, Sv. Hristova el Burgas k. a.

Intervjuis: Vida BUKOVINOVA

ZAMENHOF KIEL KURACISTO

Multe oni skribis kaj skribos pri Zamenhof — kiel kreinto de la lingvo internacia Esperanto, kiel lingvisto, tradukisto, verkisto, pensulo, kiel homo. Kaj ĉiam oni ripetas kaj akcentas nur tion, ke li estis bona kuracisto, kapabla okulkuracisto, amis sian laboron, siajn pacientojn. La faka orientiĝo de Zamenhof meritas apartan pristudon, analizon, klarigon.

El la biografio de Zamenhof oni scias, ke li devenas el multenombra familio, denaske laboremaj kaj bone edukitaj membroj. Li finis reallernejon (1873), filologian gimnazion (1879), du jarojn studis medicinon en Moskvo, (1879, 1880), kaj tri jarojn en Varsovio kaj en 1885 ricevis sian kuracistan diplomon. Zamenhof estis tro impresigema antaŭ la suferoj de la malsanuloj kaj pro tio, post mallonga praktikado kiel ĝenerala medicinisto, (en Vejseje — nun Vejsejaj) li elektis la oftalmologion. Unue li studis okulmedicinon en Varsovio (1885) kaj daŭrigis sian perfektigon pri oftalmologio en Vieno (1886).

Zamenhof komencis praktikadi unue en Varsovio. Ĉar en la ĉefurbo li ne povis gajni sufiĉe por vivteno de sia familio, li serĉis laboron aliloke, laboris en Ĥerson, laboris en Grodno, kaj finfine, pro familiaj malfacilaĵoj, li denove revenis en Varsovion.

La 22-an de novembro 1914 Zamenhof subite ricevis fortegan kordoloron. Lia filo Adam Zamenhof tuj decidis telefoni al iu sperta kuracisto inter la kolegoj kaj amikoj de Zamenhof. Zamenhof energie malpermesis, dirante, ke li same estas kuracisto. Li ne volis maltrankviliĝi dumnokte siajn kolegojn. Krom ĉio, Zamenhof estis devigita resti en la lito kelkajn tagojn. Dum tiu tempo li ne ĉesis pensi pri sia laboro, kaj ankaŭ pri siaj pacientoj. Lia filo Adam, kiu kiel juna kuracisto jam helpadis sian patron en lia medicina laboro, nun anstataŭis denove lin en la kabineto por malriĉaj pacientoj, kiuj amase vizitadis d-ron L. Zamenhof por peti konsilon kaj kuracadon.

Post tiu malsaniĝo Zamenhof jam havis matenojn liberajn por labori nur por Esperanto kaj akceptis pacientojn nur dum du horoj posttagmeze. Plue li ne estis devigita sidi ĝis postnoktomezo apud sia skribtablo por fari sian laboron Esperantan.

Zamenhof daŭrigis tutan vivon sian laboron medicinan; kvankam li movis la internacian Esperantomovadon, laboris sur la perfektigo de la lingvo, havis grandan korespondadon, respondis ĝustatempe al ĉiuj lingvaj demandoj, li ne forgesis, ne forlasis sian oftalmologian fakon. Li praktikadis medicinon ĝis la mezo de la Unua Mondmilito, ĝis la lastaj monatoj antaŭ sia morto — 14.IV.1917.

Zamenhof havis multajn adeptojn medicinistojn kiel profesie en la medicino, tiel ankaŭ en Esperanto. Tial multe da kuracistoj ellernis kaj praktikadis Esperanton por medicinaj celoj. Zamenhof arde subtenis tion. Kiam aperis la „Voĉo de Kuracistoj“ (januaro, 1908), Zamenhof interalie skribis: „... la arango estas utila kaj sukcesa kaj iom post iom kondukos al la fondo de grava revuo, kiu per neŭtrala lingvo interligos

kaj interkomprenigos la mondon medicinan.“

Dum 1908 jaro oni fondis la nunan Universalan Medicinan Esperanto-Asocion.

Zamenhof en sia vivo estis entute modesta, laborema, granda idealisto, sindona kiel kuracisto kaj esperantisto. Li mem ofte diradis, ke estus feliĉa, se li povus labori la reston de sia vivo nur por kaj per Esperanto. Per sia tre precize ellaborita programo li vere laboris aktive ĝis la fino de sia vivo por Esperanto, sed ne forlasis ankaŭ la medicinon.

Lia vortoj de A. Albault, Zamenhof apartenas al la nombro tiuj homoj, kiuj, estante fakuloj en unu branĉo, tamen famiĝis en alia.

Nun ni, kiel sanlaboristoj, havas la devon, pli profunde ekkoni la medicinan vivon kaj kontribuon de D-ro L. L. Zamenhof. Lia sindonemo al malsanuloj kaj internacia humanismo povas esti ekzemplo inda por imitado.

Prof. D-ro Kiril P. POPOV

EN URBO HO CHI MINH

Omage al la 100-jara jubileo de Esperanto la grupo „La verda koro“ plenumis la kompiladon de du vortaroj: Esperanto-Vjetnama kaj Vjetnama-Esperanto.



„Niaj etaj manoj“ — tiun kanton kantas la du vjetnamaj filinetoj — esperantistaj „burĝonoj“ el grupo „La verda koro“ en urbo Ho Chi Minh.



SINCERAJ KORAJ KONFESIOJ

ke de prauloj
mi heredis
instinkton, kiun
pro ornamo
ni poezie
nomas amo."

(„Ne multe mankis“)

Multaj estas la problemoj el nia vivo, kiujn tuŝas la poetino. En siaj poemoj ŝi meditas pri la malfacila rolo de la virino en nia nuntempo — la virino devas esti amatino, edzino, dommastrino, patrino, laborulino. . .

La poetinon maltrankviligas ankaŭ la soleco de la moderna homo.

„ . . kaj kiam mi konscias tion,
ke ankaŭ morgaŭ, ke jam ĉiam
mi matenmanĝos same sola,
do pan' plej blanka kaj plej mola
en mia buŝo amariĝas.

(„Matenmanĝo“)

Per sia poezio Urbanová esprimas sian fortan konvinkon, ke por esti feliĉaj, la homoj devas vivi en paco.

„Kaj eksonoros sonoriloj
kaj feste portos sin tra l'spaco:
Mir; Bêkel! Frieden! Pokó! Pacol!“

(„Kaj eksonoros sonoriloj“)

Eli Urbanová estas originala poetino ankaŭ el vidpunkto de la poezia formo. Kiel rimarkis la ĉeĥa Esperanta poeto Josef Rumler, ŝi havas propran riman praktikon. Ŝi majstre aplikas en siaj poemoj la aliteracion kaj asonancon. La ritmo, kiun ŝi elektas, ĉiam plene konvenas al la enhavo.

„Verso kaj larmo“ estas nova renkontiĝo kun poetino, kiun la Esperanto-legantoj ŝatas kaj en kies poemoj ili trovas ĝojon kaj konsolon, ĉar la poemoj de Urbanová estas antaŭ ĉio sinceraj koraj konfesioj.

Georgi MIĤALKOV

Urbanová, Eli: Verso kaj larmo. Elektitaj poemoj. Eldonis: Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1986, p. 85.

Mi ne povas imagi nian lingvon sen la originala poezio. La poezio donas la animon de la lingvo, riĉigas ĝin. Feliĉe, de „Ho, mia kor“ ĝis nun oni ne ĉesis krei poezion en Esperanto. La Lingvo Internacia allogis plurajn poetojn, aŭ vekis la poezion en multaj, kiuj eklernis ĝin. Multaj restis fidelaj al la originala Esperanto-poezio kaj unu el ili estas Eli Urbanová.

Antaŭ ol eklerni Esperanton, Eli Urbanová jam estis konata kiel ĉeĥa poetino. Ŝia ĉeĥlingva poemaro „Spiegulo“ aperis en 1940. En 1948 ŝi komencis lerni Esperanton kaj baldaŭ ekvertis en la Lingvo Internacia. En 1960 la konata Esperanto-eldonejo „Stafeto“ aperigis ŝian unuan Esperantan poemaron „Nur tri kolo-roj“ kaj en 1981 ĉeĥa Esperanto-Asocio eldonis „El subaj fontoj“. En 1986 en la volumo „Verso kaj larmo“ aperas ŝiaj elektitaj poemoj.

Nun, kiam en niaj manoj estas „Verso kaj larmo“, la plej nova poemaro de Eli Urbanová, ni surprize rimarkas, ke jam tridek ses jarojn ŝi aktive ĉeestas en nia literaturo kaj kultura vivo. Ŝi estas unu el tiuj niaj poetinoj, kiujn oni tuj rimarkas. Dum tridek ses jaroj Urbanová ellaboris sian originalan poezian stilon, kiun ne eblas ne rekonii.

Mi tre bone memoras la tagon, antaŭ dek jaroj, kiam mi hazarde tralegis la poemon „Tuko“ de Urbanová. La poemo ravis min kaj vekis mian intereson al ŝia poezio. Mi tralegis ĉion, kio aperis de ŝi ĝis tiam, kaj mi konstatis, ke vere Urbanová estas unu el la plej originalaj kreantoj en nia poezio.

Legante ŝiajn poemojn el „Verso kaj larmo“, mi denove demandas min, kio ĝuste estas la kialo, ke Urbanová apartenas al la nombro de plej elstaraj Esperanto-poetinoj. La respondo certe estas — ŝia profunda sento pri la poezio. Urbanová naskiĝis poetino, sed ne ĉiam tio sufiĉas, kaj mi opinias, ke pli gravas la fakto, ke ŝia poezio estas sincera, profunde konfesa poezio.

Tion sentas mem la poetino, ĉar en sia poemo „Kiam mi versas“ ŝi atentigas nin:

„Kaj mi pri amo kaj mi pri tomb',
kiam mi versas, estas mi seksbomb'.
Jes, hazardema, ekstra personec'.
Mi min disdonas po poem', po pec'.“
(„Kiam mi versas“)

Jes, en siaj poemoj Urbanová disdonas sin, po poem', po pec'. Ŝi strebas enrigardi profunden en sin mem kaj tie trovi respondon al la eternaj demandoj.

„Aŭ mi por la ekkono
penetris en la teron,
en kies profundego
perdiĝis mia vojo“.

(„Abismo de ekkono“)

Amo estas ĉefa temo en la poezio de Urbanová. En siaj poemoj la poetino konstante meditas pri tiu sento.

„Ne multe mankis
kaj mi kredis,



Honora postenado dum solena inaŭguro de bareliefo de D-ro L. L. Zamenhof sur strato „Esperanto“ en Pazarĝik.

Literatura konkurso de „BE“

(PRITAKSOJ KAJ INSTRUOJ)

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto kaj la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio en n-ro 3/1986 de „Bulgara Esperantisto“ estis anoncita Internacia Literatura Konkurso pri jenaj ĝenroj: a) rakonto, b) eseoj, c) biografia skizo pri eminentaj esperantistoj kaj ĉ) versaĵo.

Ĝis la lasta limdato — 30-a de septembro 1986, en la redakcio estis ricevitaj entute 30 konkursaĵoj: a) rakontoj — 4, b) eseoj — 2, c) biografiaj skizoj — 3, ĉ) versaĵoj — 24; el eksterlando — 2 versaĵoj kaj 1 prozaĵo.

La ĵurio en konsisto: Dončo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, Lidia Raeva, redaktoro kaj Venelin Mitev — membro de la redakta komitato, esprimas dankon al la partoprenintoj el Bulgario kaj el eksterlando pro ilia fervoro kaj estimo al la konkurso. Laŭ plej objektiva pritakso la ĝenerala literatura kaj lingva nivelo de la konkursaĵoj estas relative bona. El ĉiuj 24 poeziaĵoj elstaras nur kelkaj, kiuj plenrajte meritis premiojn. Multaj el niaj legantoj versas preskaŭ konvinkitaj, ke sufiĉas rimoj. . . Vere, ankaŭ versado estas lernebla, sed nepras talento! Kelkaj prozaĵoj kaj biografiaj skizoj estas bonaj kaj kuraĝigaj — laŭteme kaj laŭstile — kaj ricevas meritajn premiojn.

La literatura konkurso de „BE“ elmontras la neceson de serioza kaj sistema laboro de gvidantoj de literaturaj rondoj ĉe E-societoj, kiuj devas serĉi kaj kreskigi talentojn el ĉiuj esperantistaj generacioj. Tiuj, kiuj jam debutis per literaturaĵoj en Esperantaj periodaĵoj — pli zorgeme kaj obstine plialtigu la lingvokanon kaj la nivelon de sia literatura verkado, por ke nia Esperanta literaturo refreŝiĝu per novaj talentoj.

Al ĉiuj premiitoj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras novajn sukcesojn kaj fruktodonan verdadon!

LA PREMIITOJ

A. RAKONTO

I premio — ne estas aljuĝita

II premio — Nadja Sirkova el Ruse, pro la rakonto „Centjara amo“

III premio — Nevena Nedelĉeva el Sofio, pro la rakonto „Renkontiĝo“

B. ESEJO

I kaj II premioj ne estas aljuĝitaj

III premio — Stefan D. Ĉirpanliev el Jambol, por „Estu eterna la sunsubiro“

C. BIOGRAFIA SKIZO

I kaj II premioj ne estas aljuĝitaj

III premio — Antoaneta Atanasova el Sofio, pro „Belartaj verkoj kaj tradukoj de ADA“

C. VERSAĴO

I premio ne estas aljuĝita

II premio — Ŝirin Ahmad-Nia el Irano, pro la versaĵo „Paco“

III premio Toma Ajolov el Plovdiv, pro la versaĵo „Nova kanto“

Kuraĝigaj premioj: 1. Gustavo C. Mokales el Kubo — pro la versaĵo „Koloroj“ (dediĉita al Bulgario)

2. Penka Papazova el Jambol — pro la versaĵo „Koro“

3. Angel Borisov Velez el Plovdiv — pro la versaĵo „Ni ĵuruli“

Enlanda movado



JARKUNVENOJ DE POSTISTAJ SOCIETOJ

„HEROLDO“ — Sofio

La jarkunveno de la sofia poŝtista esperantista societo „Heroldo“ okazis je la 3-a de februaro 1987.

Gaste ĉeestis gekamaradoj Peev kaj Ganeva el la Sofia Urba Estraro de BEA kaj Draguŝko Petrov — prezidanto de IPTEA.

Raporton pri la laboro de la estraro kaj la societo faris Sneĵana Terzieva.

En la demandoj kaj eldiroj de la partoprenantoj oni vidis maltrankvilon pro la malbona organiza stato kaj maljuniginta membraro de la societo, en kiu el 42 membroj 30 estas pensiuloj.

Valorajn eldirojn faris Draguŝko Petrov kaj Ivan Peev. Draguŝko Petrov pritaksis la laboron de la societo kiel ne kontentiga kaj faris konkretajn proponojn pri plibonigo de la agado kaj pri aktiva partopreno en la socialisma konkurado inter la esperantistaj societoj. Ivan Peev respondis al la metitaj demandoj kaj esprimis esperon pri stabiliĝo de la societo, kiu havas eblecon disvolvi pli grandan Esperantan laboron en la sistemo de la ekonomia unuiĝo „Komunismo“.

Fine estis elektita nova estraro de la societo kun prezidato Paskal Parvanov.

Ivan JORDANOV

„FLUGANTA LETERO“ — Veliko Târnovo.

La raporton pri la dujara societa agado faris la prezidantino Mladenka Rusinova. Si substrekis, ke „Fluganta letero“ atingis bonajn rezultojn en disvastiĝo de Esperanto. La societo kreskis per 8 novaj membroj. Estas malfermitaj kaj funkcias du kursoj de Esperanto. Post tralego de la raporto, kiu temis pri sukcesoj kaj negativaj flankoj en la laboro de la estraro, okazis diskutoj.

Eldiron faris Miĥail Petkov — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Veliko Târnovo.

La kunveno akceptis decidojn pri la estonta laboro. Estis elektita nova societa estraro.

Petăr PETROV



Partoprenantoj en la Esperanto-kurso ĉe Distrikta Junulara Domo — Ruse.



La lernantoj-esperantistoj el la Sporta Lernejo en Veliko Târnovo ĝoje bonvenigis la operetan kantistaron Plamena Nenova el la loka Drama-Muzika Teatro „Konstantin Kisimov“. Post ŝia prezento fare de la teatra dramaturgino Bistra Givodarova, eksonis operetaj arioj kaj Esperantaj kantoj.

La juna populara kantistino estas esperantistino. Ŝi koncertis en Aŭstrio, Jugoslavio, Rumanio.

Fine okazis amika konversacio, kiun gvidis la Esperanto-instruisto Stefan Ljubenov.

Olga CANKOVA

AMIKO DE BULGARIO

En la antaŭvespero de la nova jubilea jaro 1987, la ŝumenaj esperantistoj havis neforgeseblan renkontigon. Al ili gastis Andy Künzli — studento pri slava filologio en la Universitato de Zürich, redaktoro de „TEJO tutmonde“, ĝenerala sekretario de Svisa Esperanto-Societo kaj redaktoro en la E-fako de Svisa Radio Internacia.

En la klubejo de la Distrikta Komitato de la Patrolanda Fronto, antaŭ dekoj da junaj kaj maljunaj geesperantistoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo, Andy Künzli, en Esperanto kaj bulgara lingvo, rakontis: „Trian fojon mi estas en via lando. Unuan fojon mi ĝin vizitis tre juna, sed jam tiam min impresis la beleco de Bulgario, viaj moroj, kutimoj, via popolarto. Tio min tre impulsis kaj mi decidis nepre studi slavan filologion. Sumen kaj vian regionon mi vizitas unua foje. Mi deziris vidi la lokojn Pliska, Madara, Preslav, de kie la bulgaroj ekmarŝis, sed, bedaŭrinde, la neĝo kaj la frosto malhelpis min. Tamen mi venos denove! Estas bulgara proverbo: „Dika neĝo — multe da pano!“ Mi deziras al vi sukcesojn dum la jubilea 1987, pacon kaj interkomprenigon inter la popoloj!“

Kaj en la „Ora memorlibro“ de societo „Vekiĝo“ la gasto skribis: „Neniam mi forgesos la varman kaj sinceran renkontigon kun la geesperantistoj kaj la civitanoj de Sumen! Via amiko el Svislando!“

Cv. STOJANOV

Kie • Kiam • Kion

RENKONTIGO DE POPOLAJ ORKESTROJ

La VII Internacia Renkontigo de Popolaj Orkestroj en Toruń kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo okazos de la 19-a ĝis la 22-a de julio 1987.

La aranĝon povas partopreni originalaj popolaj muzikgrupoj (2—6 personoj), kiuj prezentas muzikon de sia regiono uzante tipajn, karakterizajn instrumentojn. Ni ĝojus, se inter la muzikistoj estus dancistoj aŭ kantistoj. Se la grupo ne estas granda, la dancparo povas akompani la orkestron. La tuta grupo ne devas esti pli ol 10-persona.

Ĉiu grupo devas esti akompanata de esperantisto-interpretisto, kiu pere de Esperanto kontaktigos kun la organizantoj kaj prezentos la programon de la grupo en Esperanto.

La organizantoj garantias en Toruń loĝadon kaj manĝadon: de la vespermanĝo la 18-an ĝis la matenmanĝo la 23-an de julio. Krom tio ni garantias malgrandan poŝmonon por ĉiu partoprenanto. Vojaĝkostojn pagas la partoprenantoj mem.

Bonvolu skribi la nomon kaj adreson de la interesiĝinta grupo, por ke ni povu sendi oficialan inviton.

Nia adreso: Muzeum Etnograficzne
87-100 TORUŃ, Waly Gen. Sikorskiego 19,
Pollando

GASTIGADO PROPONATA

La renkontigoj en Dudince estas jam tradiciaj. Ĉi-jare ili okazos jene: la printempa en la periodo 3—9 de majo, la aŭtuna — de la 30-a de aŭgusto ĝis la 5-a de septembro. Sed oni povas resti ankaŭ pli longe. La semajna restado kun 6 tranoktoj kostas nur 150 Kčs (15 levojn) Kuirejo estas senpaga, je ĉies dispono. En la programo: banado en saniga, mineralakva baseno, interesaj ekskursoj kaj prelegoj pri la vivmedio kaj naturprotektado, pri vegetarismo, makrobiotiko, naturkonforma senvianda vivmaniero, pri joko kun ekzercado. Partoprenintoj en ekspedicioj tra Pamiro kaj Himalajo rakontos pri siaj spertoj, pri la Hunza-popolo (pri kiu ni jam kelkfoje skribis en nia bulteno) en kiu estas eĉ 150-jaraĝaj homoj. Ĉiuvespere vin atendas kultura programo, lumbildoj, esp. filmoj, ktp.

Informojn petu kaj aliĝilojn adresu al:
Ernesto Vana, CS-962 71 DUDINCE, Slovakio, ĈSSR.

LETERVESPERO ORGANIZOTA

„Esperanto-klubo „Horizonto“ en Jurbarkas (Litovio) aranĝos fine de oktobro 1987 letervesperon okaze de la 100-jariĝo de la Internacia Lingvo Esperanto kaj la 15-jara datreveno de fondiĝo de klubo „Horizonto“.

Al ĉiuj salutsendaĵoj el la tuta mondo la klubo dankos per belaj poŝtkartoj, libroj, broŝuroj, sondiskoj, Skribu al:

Esperanto klubo „Horizonto“
Jurbarkas, Box-10
Litovio 234430
Sovetunio



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Desislava Miteva (16-jara) — 1233 Sofio, str. „Kiril Nikolov“ bl. 215, vñ. A — pri literaturo, moderna muziko kaj novaj filmoj.

Bojidarka Popjivkova (37-jara ekonomistino), 174 cm alta, kun diversaj intereso — 1000 Sofio, str. „11-a de aŭgusto“ 35, vñ. B — deziras korespondi edziĝele — kun ĉl.

Cvetanka Lilova — gvidas E-kurson, en kiu partoprenas diversaj homoj: 10-jaraj lernantoj, laboristoj, oficistoj, juristoj, medicinistoj kaj instruistoj. Ili dez. kor. kun ĉl, por praktiki Esperanton kaj interŝanĝi ideojn, PM kaj BK. La respondoj estas garantitaj. Komuna adreso — 2161 Pravec bl. 18, vñ. A, ap. 2, et. 1, por Cvetanka Lilova.

CINIO

Zhang Yi Qun (25-jara eleganta fraŭlo) — Yi Chuan San Cun 110 Hao 317 Szi, Shanghai — kun geesperantistoj pri ĉiutaga vivo.

HUNGARIO

Góczán Masinja (26-jara) — 2400 Dunaŭjidos, Kossuth L. u. 14 fsz. 1 — kun gebulgaroj. Interesiĝas pri hundoj.

IRANO

Navvab Mozaffari (25-jara fraŭlo) — Lasnt-e-Nesna, Bolur Forusni-e-Bina Rasnt — kun bulgaraj gesamideanoj.

NEDERLANDO

Anton Blickman — Palamedesstraat 17, 2026 VV Haarlemo, tel. 3123381306 — serioze pri tridimensia fotografio, proksima fotografio (marko), orkideoj kaj papilioj.

POLLANDO

Krzysztof Biesaga (26-jara laboristo) — PL-58-200 Dzierzoniow, Pl. Wolności 25/5 — pri turismo, literaturo, folkloro; kolektas PM, BK.

Bogusław Urbaniak (28-jara edziĝinta laboristo) — PL-42-620 Nakłosi, ul. Kosciuszki 7 — pri mondpaco, sporto, vojaĝoj; kolektas BK.

SOVETUNIO

Leonid Budarin (29-jara laboristo) — SU 352721 Majkop, Ĥakurate 636/28 — deziras amikan korespondadon kun ĉl.

Membroj de E-klubo „Rado“ — SU 400115 Volgograd, str. Ĉujkova 65, Molodjojnnyj centr. ZKS — serĉas geamikojn el la tuta mondo.

Vladimir Galenko — SU 187500 Tiĥvin-3 Leningrad. obl. poŝtrestante — serĉas korespondamikojn por siaj lernantoj 7—14 jaraj.

Kostja Ĉernjavsĥij (14-jara lernanto) — SU 187500 Leningr. obl. Tiĥvin Mikrorajon 1 16-26 — kolektas PM, BK pri urboj.

SVEDIO

Anna Lorentz (verkistino) — Malmgatan 5, 33100 Värnamo — pri literaturo kaj arto kun gebulgaroj.

ENHAVO

- II Aktuale pri Zamenhof (Nikola Aleksiev)
- 1 La premio Zamenhof 1986
- 3 Fiero kaj gloro bulgara (Lidia Raeva)
- 4 Levski (Ivan Vazov)
- 5 Leciono (H. M. Hrima); La Apostolo (Simeon M. Simeonov)
- 6 Malutilaj kutimoj (N. Bogdanov)
- 7 Niaj veteranoj: Verkisto-esperantisto (Evgeni Georgiev); Favorato de la publiko (Belka Beleva)
- 8 Forpasis Ljuba Bojaĝieva
- 9 Nia internacia agado (Petko Bonev)
- 10 Juna Esperantisto: Kunlaboro kun BEJ? Jes, volonte! (Maria Bojaĝieva); Ĉu la unua hirundo? (Hristo Beličenski)
- 10 La olivbranĉo simbolas pacon (Maria Janĥkova)
- 12 Interŝanĝo de sperto: Pli da atento al la malgrandaj societoj (Dimităr Hristov); Instruado de Esperanto en Burgas-distrikto (Vida Bukovinova)
- 13 Zamenhof kiel kuracisto (D-ro Kiril Popov)
- 14 Ni recenzas: Sinceraj koraj konfesoj (Georgi Miĥalkov)
- 15 Literatura konkurso de „BE“ (rezultoj)
- 15 Enlanda movado
- 16 Kie, kiam, kion
- III Deziras korespondi
- IV Distroj

Sur la kovrilpaĝo: portreto de Vasil Levski — la organizanto de la bulgara nacia revolucio.

ONI SERĈAS ABSTINENCULOJN

Kun celo organizi esperantistan abstinenculan societon, ni serĉas esperantistojn aktive batalantajn kontraŭ alkoholorinkado kaj tabakfumado. Ni deziras seriozajn daŭrajn kontaktojn kun abstinenculaj organizaĵoj en via lando pere de esperantistoj.

Bonvolu skribi al
Eŭgeno S. Perevertajlo
SU-700000 Poĉtamt
ab/k 140, Taŝkento
UZBEKIO, USSR

NI KONDOLENCAS

La 10-an de januaro 1987 en u. Radomir subite forpasis nia karmemora veterano **KOSTADIN ALEKSANDROV** — membro de DE de BEA, Pernik. En 1919 li fondis E-societon „Fajrero“ en Radomir kaj ĝis sia lasta tago aktive agadis sur la Esperanto-kampo.

Ĉefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distroj

LA UNUAJ VIRINOJ-KURACISTINOJ


Medicino, samkiel multaj aliaj sciencoj (samkiel muziko, literaturo kaj belarto) estis preskaŭ ĉiam rezervita por viroj. Tamen, se oni esploras la pasintecon, oni malkovras, ke multaj virinoj postlasis spurojn en la medicino.

Ni reiru al la jaro 2700 a.n.e. kaj ni trovos Merit Ptah, pri kiu ni havas sciigon. Sur ŝia tombo, skulptita el ŝtono, daŭre rezistas al la tempo ŝia meditema portreto. Multaj jarcentoj pasis de tiam. Sed eble Merit Ptah, en la praktikado de ŝia profesio, ne spertis la problemojn, kiujn devis alfronti la atenanino Agnodika, vivanta en la tria jc. a.n.e. La leĝoj de Ateno ne antaŭvidadis virinajn kuracistojn; sed Agnodika ruze evitis tiujn leĝojn, surmetante virajn vestojn. Kaj ŝi iĝis tiel lerta kuracistino, ke ŝiaj kolegoj, plenaj de envio, misakuzis „lin“ pri seksperforto kontraŭ iuj pacientinoj dum la praktikado de la profesio. Kompreneble, estis facile al Agnodika pruvi la neeblecon de la akuzoj, sekve de tio Ateno malfermis la medicinajn studojn al virinoj.

Kaj ni konsideru la mezepokan Italion de la XI-a jc: en la „Salerna Skolo“ pri Medicino, ankoraŭ hodiaŭ apreziata, iu virino, kiu nomiĝis Trotula Platearia, estis „magistrino pri medicino“. Si okupigis pri ginekologio-kaj akuŝarto, kaj verkis la unuan traktaĵon pri tiu temo: „Pri la virinaj suferoj“. Same en Salerno, kelkajn jarcentojn pli malfrue, en 1430, Costanza Calenda havis la honoron esti la unua virino en la mondo, kiu doktoriĝis pri medicino.

(El „Heroldo de Esperanto“, 9/1986)

PERFEKTA EKZAMENITO



— Nu, diru: ĉu pri la aŭto-ekzameno, ĉio bone okazis?


— Kredu min! Kiom da emocioj! Mi tre atentis miajn manovrojn: mi saltis, mi trakuĉis la rapidumojn, mi akcelis, mi bremsis. . .

Verdire la ekzamenanto ankoraŭ nenion diris. . . li ankoraŭ ne rekonsciigis!

UNUAJ BULGARAJ PARASUTISTOJ

La unua modela salto per paraŝuto okazis en Bojuriŝte (apud Sofio) en 1923. La paraŝutisto estis reprezentanto de firmao por produktado de paraŝutoj. Tuj post la salto de la franco saltis ankaŭ du bulgaroj — la leŭtenantoj Stoev kaj Hristov. Ili malfermis siajn paraŝutojn je alteco de 100 metroj, sed sukcese alterigis.

MAGIA TRIANGULO



En la cirklojn de la triangulo enskribu ciferojn de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu linio de la triangulo la sumo estu 21. Sendas: Gaibamavicius Stasy, Vilnius, Litovio, USSR.

Anekdotoj

NEORDINARA PACIENTO

Malsanulo (al la kuracisto):

— Mi ofte sentas kapdolorojn, sed malgraŭ tio mi ne fartas malbone. . . Mi mangas kun apetito de lupo, mi laboras kiel ĉevalo, vespere mi revenas hejmen laca kiel hundo, kaj nokte mi dormas profunde kiel urso.

Kuracisto: Se estas tiel, mi rekomendas al vi konsulti bestkuraciston. . .

STRIKTE OBEEMA

— Doktoro, antaŭ jaro vi resanigis min de mia reŭmatismo.

— Estas ĝuste.

— Kaj tiam vi admonis min, ke mi evitu malsekecon.

— Ankaŭ tio estas tiel.

— Sed mi tre volonte banus min. Ĉu vi bonvolus tion permesi?

— Jen la kuracisto alvenis!

— Venigu lin alian tagon. Hodiaŭ mi ne fartas tute bone.

— Halo! Ĉu estas tie la banko, kie oni serĉas unu kaston?

— Ni serĉas du: la novan kaj la antaŭan.

Maljuna viro elnombras antaŭ la kuracisto siajn malsanojn: astmo, iskiatikio, sangopremo, reŭmatismo.

— Sed vi devas posedi feran sanon, por povi elteni ĉion ĉi! — diras mirigite la kuracisto. . .